




# HUNGARA VIVO

**4**  

---

1974  
8,- Ft





# ÜREGES GIPSZ PERLIT KAVHAVA GIPSO PERLIO

Bazmaterialo:

**Modelo-Gipso MG-II,  
Kaj Ŝveligita Perlito Pl.**

**Ĉefaj teknikaj karakteriziloj:**

Dikeco: 60 mm

Largeco: 600 mm

Longeco: 2500—3000 mm

Elekteblaj longostupoj 950 mm

Pezo: 35 kg/m<sup>2</sup>

Ŝarg-masiveco: 60 kp/cm<sup>2</sup>

Aer-sonizolado:

E  
R 22 dB

Limvaloro de fajrorezisto: 1 horo

Mezur-toleremo:

Diko + 1 mm

Largo ± 1 mm

Longo + 2 mm

La surfacoj de la fabrikitaj elementoj estas spegulglataj kaj kontinuaj. Aer-enfermitaĵo apenaŭ trovebla. Post kiam la elementoj estas enkonstruitaj, kaj la kunigintaj surfacoj estas laŭ la preskriboj faritaj, ili tuj estas pentreblaj, tape-teblaj.

La elektro- kaj akvo-muntaĵoj estas adapteblaj.

La materio estas prilaborebla: segebla, borebla, skulptebla. prilaborado estas masinizebla.

La malpezajn izol-vandelementojn fabrikas:  
Komárom megyei Állami Építőipari Vállalat

(Ŝtata Konstrua Entrepreno de Departemento Komárom)  
2800 Tatabánya, V., Komáromi út 6.  
Telekso: 27-314 Telefono: 11-01

## IZOLVAND—ELEMENTO

La teknika preskribo por planado kaj konstruado:

Direktivo estas ME—94—66. Planado de ÜGP-plankoj estas permesita laŭ dekreto kaj teknika preskribo 24/69 ÉVM.

La fabrikadon ni plenumas laŭ patento ÉTI.

Per aplikado de ÜGP-plankoj oni ŝparas ĉe ĉiu m<sup>2</sup> 0,6 horojn. Do ĝi estas pli rapide pretigebla, ol la tradicia duflanke mortarita brikmuro.

# ÜGP



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio  
1368. Budapeŝt, Kenyérmező u. 6.  
Aperas dumonate  
XIV. jaro, 1974. 4-a numero

## ENHAVO

D-ro J. Mátéffy: Pri la hungara konstitucio	1
J. Szabó: Pri nia ekonomio	2
Nia eksterland-komerca bilanco	3
István László: Hungario kaj Konsilio de Reciproka Ekonomia Hel-po	4
D-ro O. Haspra: Industrien provincent!	7
La hungara socialisma agrokulturo (K.K.)	9
William Auld: Kiel mi amikiĝis kun Imre, Sándor, Mihály k.a.	11
J. Szekeres: Panoramo	12
V. Benczik: Literaturlegado en fremda lingvo	14
Mihály Gergely: La sonĝo de la akvodukto-muntisto	22
Poemoj de László Benjámín kaj Gábor Garai (K. Kalocsay)	28—29
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj	30
Krucvortenigmo	31
Ekzameno sen risko	32

Sur la titolpaĝo: Ĉe la enirejo de la Budapeŝta Internacia Foiro

1949. 08. 20. estas festotago en Hungarlando. Antaŭ 25 jaroj en tiu tago estis proklamita la unua skriba konstitucio de la hungara popolo. La leĝo pri la Konstitucio de la Hungara Popolrespubliko (numero XXa el 1949) ĉi-jare havas jam kvaronjarcentan paseon kaj tio donas al ni okazon prezenti skizon pri la historio kaj kelkaj detaloj de tiu ĉi baza leĝo de la hungara nacio.

Dum pli ol mil jaroj la popolo vivigis kaj defendis Hungarlandon per siaj laboro, forto kaj oferoj. Tamen, la ŝtatpotencon posedis la regantaj klasoj, kiuj ĝin uzis por subpremi kaj ekspluati la popolon. Venis nova tempo kaj kun ĝi nova epoko, kiam en 1945 Sovetunio liberigis ankaŭ nian patrujon el sub la faŝisma subpremo kaj malfermis la vojon antaŭ la hungara popolo al la demokratisma evoluo. La laboristoj, kamparanoj kaj la progresema intelektularo, mallonge la laborularo, rekonstruis la landon grave detruitan de la lasta mondmilito, kaj en batalo kontraŭ la mastroj kaj defendantoj de la malnova duonfeŭdisma-duonkapitalisma sociordo akiris kaj stabiligis la potencon de la popolo.

Ŝanĝiĝis ankaŭ la sociordo. La malnovan, baziĝantan sur kapitalismaj principoj, anstataŭis nova sociordo, kies bazo estas la laboro. Post kvaronjarcenta evoluo ni atingis, ke la hungara popolo en nacia unueco strebas al plena elkonstruo de la socialismo.

Nia konstitucio fidele respegulas la bazajn ŝanĝojn estiĝintajn ekde nia liberiĝo en la politika, ekonomia kaj socia vivo.

## Politika sistemo

Konforme al la jam atingitaj rezultoj, la konstitucio fiksas, ke la Hungara Popolrespubliko estas socialista ŝtato, en kiu ĉiu potenco apartenas al la laborularo, al la

laboranta popolo. La gvida klaso de la socio estas tiu de la laboristoj. Tiu ĉi klaso disponas pri la potenco, federacie kun la kooperativa kamparanaro kaj kun la intelektularo. La popolo uzas la potencon pere de siaj senditoj, deputitoj.

Estas fiksate, ke la ŝtato de la Hungara Popolrespubliko defendas la liberon kaj potencon de la popolo kaj, ke ĝi batalas kontraŭ ĉiuj formoj de la ekspluatado de l' homo fare de homoj. La leĝo estas konsekvenca, ja socialismo signifas tian sociordon, en kiu jam ne ekzistas homa ekspluatado.

La Hungara Popolrespubliko estas parto de la socialisma mond-sistemo, sekve ĝi evoluigas la kontaktojn kun la socialismaj landoj. Sed por intereso de la paco kaj homa progreso, ĝi klopodas kunagadi ankaŭ kun la ceteraj popoloj kaj landoj de la mondo.

## Ekonomia ordo

Konforme al la realo, la konstitucio konstatas, ke en nia lando regas socialismaj produktilatoj. La bazo de la ekonomia ordo estas la socia proprieto de la produktiloj, kaj la ekonomian vivon reguligas ŝtata popolekonomia plano. La gvido kaj kontrolo okazas pere de la ŝtataj entreprenoj, kooperativoj kaj aliaj organoj. Aliflanke, la ŝtato rekonas kaj defendas la privatan proprajn. Ĝi rekonas la socie utilan agadon de la etproduktistoj, metiistoj kaj certigas la rajton pri heredo. Tamen al la privataj proprieto kaj iniciato ne licas ofendi la komunajn interesojn.

## Socia ordo

Ĉi-rilate la konstitucio manifestas kaj disponas jene. „La bazo de la socia ordo de l' Hungara Popol-

# Pri nia ekonomio

Konforme al la karaktero de nia ŝtato, en Hungarlando regas socialisma sociordo, sekve la decida plimulto de la produktiloj troviĝas en socia proprieto. Ĉe ni estas ekonomia bazleĝo, ke la konstante kreskiĝantajn materialajn, socialajn kaj kulturajn bezonojn de la socio oni devas ĉiam pli altnivele kontentigi helpe de konstanta evoluigo de la tekniko. Pro tio estas necese organizi la sistemon de la produktado, varŝanĝo, divido kaj konsumado. Tiun taskon plenumas la ŝtato sur bazo de planmastrumado.

## Planmastrumado

Ĉe ni de 1946 ekzistas planmastrumado. De tiam nia ekonomio multe evoluis: nia nacia enspezo krekigi kvar-kaj duoble, nia industria produktado naŭoble. Tiun ĉi rapidan evoluon oni povis realigi nur per akordigitaj long-, mez- kaj mallongetapaj planoj.

Gravas, ke niaj ekonomiaj gvidorganoj antaŭvidu la direkton kaj mezuron de la plej gravaj ekonomiaj procezoj. Tion akcelas la long-etape (perspektiva) popolekonomia plano. Ĝi difinas ĝenerale por 15 jaroj:

- la formigon de la evolutakto kaj ĉefajn proporciojn de la popolekonomio;
- la pli gravajn konceptojn pri evoluigo de la produktocirkonstancoj;
- la pli gravajn celdifinojn de la internaciaj ekonomiaj interrilatoj;
- la konceptojn koncerne la vivkondiĉojn de la loĝantaro;
- la planon por plibonigo de la sociala, kultura kaj higiena cirkonstancaro.

Tiun planon ellaboras komisiono de fakspertuloj.

En la mez-etape plano, valida por 5 jaroj, oni difinas la ĉefan mezuron kaj ĉefajn proporciojn de la ekonomia evoluo, la gravajn taskojn de la centra ekonomidirektado. Ekzemple la 1970—75-a popolekonomia plano enhavas interalie la sekvajn:

- kreskigi la efikecon de la produktado;
- sisteme kaj relative rapide altigi la vivnivelon de la loĝantaro;
- kreskigi la enspezojn de la ŝtata budĝeto, efektivigi racionan ŝparadon sur la kampo de la elspezoj;

- plivastigi niajn internaciajn ekonomiajn interrilatojn.

La jara popolekonomia plano baziĝas sur la mez-etape. La registaro baziĝante sur la jaraj planoj, difinas la plenummodojn de la konkretaj taskoj.

La perspektivan, mez-etapan kaj jarajn planojn aprobas la parlamento.

## Nacia budĝeto

La plej grava parto de la jara plano estas la budĝeto, pretigata por po unu jaro. Ĝi preskribas la financajn devojn de la ŝtataj entreprenoj, kooperativoj kaj loĝantaro, plenumotajn al la ŝtato kaj difinas: kiom da sumoj oni rajtas uzi por realigo de la ŝtataj taskoj.

La plejparton de la enspezoj liveras la ŝtataj entreprenoj, ceteraj fontoj estas: impostoj laŭ privataj enspezoj, salajroj, komerca trafiko ktp. Ankaŭ la industriaj kooperativoj pagas imposton. La loĝantaro pagas ĝin ĉefe laŭ domo, tero.

Inter la ŝtataj elspezoj rolas unuavice tiuj por la plenumo de kulturaj, higienaj, komunumaj taskoj, ekz-e konstruo kaj subteno de hospitaloj, lernejoj, porsanaj institucioj, ktp.

respubliko estas la laboro". Alia dispono tekstas: „Por ĉiuj laborkapablaj civitanoj estas rajto kaj devo labori laŭ siaj kapabloj". La rajto pri laboro restus nur bombasta frazo, se ne estus samtempe certigita la ebleco labori. Pruviĝis en la praktiko, ke ekde nia liberiĝo ĉesis la senlaboreco kaj ne ekzistas jam timo pro ia eventuala ekonomia krizo. Male, ni baraktas multloke pro manko de la necesaj laborfortoj. Vere, en la so-

cialismo nur tiu ne trovas laboron, kiu ne volas ĝin havi.

La socialista ŝtato laŭsence konsistas mem el la tuto de la laboruloj, do, la produkto de la laboro fortikigas ilian propran ŝtaton kaj pere de tio, prosperiĝas ilia propra bonstato.

La civitanoj per sia laboro, per partopreno en laborkonkuroj, per firmigo de labordisciplino kaj perfektigo de labormetodoj servas vere la aferon de la socialista kon-

struo. Tiel ricevas profundan moralan sencon la slogano: labori estas ĉe ni honora devo.

Kaj fine, konforme al la socia stablo de socialisma karaktero, konstitucie estas deklarike, ke la Hungara Popolrespubliko strebas konsekvence realigi la socialistan principon:

„Ĉiuj laŭ sia kapablo, al ĉiu laŭ sia laboro".

d-ro Jozefo MATEFFY



## Reguladsistemo ekonomia

Kiel dirite, granda parto de la ŝtataj enspezoj konsistas el la enpagoj de la diversaj entreprenoj, kooperativoj. Do gravas, ke ilia mastrumado okazu inter laŭplanaj kadroj. La ŝtato tion certigas per rektaj kaj nerektaj metodoj (salajroregulado, prezpolitiko, sistemo de subtenoj, dogan-, devizo-politiko, ktp.)

En la antaŭaj jaroj la entreprenoj devis plenumi nur la parton de centra ŝtata plano, preskribitan al ili. Pro tio mankis al ili la necesa memstareco, ili ne estis sufiĉe interesataj por la pli bona, ŝparema mastrumado.

En 1968 oni enkondukis novan ekonomian sistemon. De tiam la entreprenoj memstare mastrumadas el siaj fontoj. Ili decidas libere: kion, kiel kaj kiom ili produktas. La fundamenta celo ĉe la entreprenoj estas atingi kiel eble plej grandan gajnon kun kiel eble plej malgrandaj elspezoj. Post la valoroj konsumitaj aŭ utiligitaj en la produktado (materialo, salajroj, maŝinoj, kpt.) ili devas pagi imposton, tio trudas al la entreprenoj ŝparadon. Kaj ĉar ili rajtas vendi siajn produktaĵojn sen ligiteco en la merkato, ili estas devigataj produkti serĉatajn, pli bonkvalitajn, pli malkarajn varojn. Samtempe ili devas preni sur sin ankaŭ la riskon de sia decido.


Nia ŝtato planas evoluigon de tiu ĉi sistemo. La celo estas, ke oni pli efike uzu la maŝinojn produktante pli multe, ŝparu pli la homan laboron (pro manko de la fakuloj) kaj la entreprenoj ricevu ankoraŭ pli grandan memstarecon en la produkto kaj vendo.

Jozefo SZABÓ

Trad: Jozefo CSEH

# Nia eksterland-komerca bilanco estas pozitiva

La 1973-jara internacia interkomercado de Hungario:  
79,3 miliardoj da forintoj (deviza valoro)



En 1973 la eksterlandkomerca bilanco de nia lando estis ree pozitiva. La valoro de la importo superis 37,3 miliardojn, kaj tiu de la eksporto atingis 42 miliardojn da forintoj.

La 58% de la importo kaj 61% de la eksporto plenumiĝis laŭ kondato en rubloj. La ĉefaj konto-rubrikoj en ambaŭ rilatoj estis: energiofontoj (ŝton-oleo kaj ŝtonoleo-produktoj), bazmaterialoj, duonproduktaĵoj (diversaj plasto), maŝinpartoj, maŝinoj. La plejparto de la kapitalisma importo konsistis el plant- kaj best-originaj albumin-furaĝoj — kun deviza valoro de pli ol 1 miliardo da forintoj.

Kadre de la hungara eksporto, la maŝin-eksporto fariĝis pli granda per 21%. Ties plej grandan parton konsistigis kompleksaj fabrik-instalaĵoj, nutraj-industriaj maŝin-serioj, veturiloj (660 aŭtobusoj), inform-teknikaj instalaĵoj kaj instrumentoj. La 36%-a pligrandiĝo de la kapitalisma interkomercado doniĝis el nutraj-industriaj produktoj (bovoj, kortbirdoj, pan-greno, maizo, vino), duonproduktaĵoj, laminat-produktoj, aluminio.

La aktiva flanko de la eksterland-komerco montris 4,7 miliardojn. Laŭ fakuloj la pliiĝo de la hungara eksporto estigis unupartite, en socialisma interrilato — precipe en la maŝin-induŝtrio — la plilargiĝo de la oferto, aliparte, en kapitalisma rilato, la mendo-kreskiga efiko de la kurzoŝanĝoj.

Tr. Imre ZOLTÁN



# Hungario kaj la Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpe

Pasintjare plenumis la 25. jaron la internacia ekonomia kunlabor-organizo de la socialismaj landoj: Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpe (KREH). La forpasinta kvaronjarcento estis historiformanta periodo en la vivo de la socialismaj landoj, periodo de grandioza evoluo kaj ekonomia fortiĝo. La rezultojn alportis la ĉiam pli vastiĝanta ekonomia kaj scienc-teĥnika kunlaboro de la socialismaj landoj, respektive la multflanka organo de la kunlaboro: KREH.

Dum la forpasintaj 25 jaroj pruviĝis la grandega vivoforto de la socialisma internacio kaj tiu de la nova socia ordo. La internacia reputacio de la socialisma komunumo kreskas de jaro al jaro, tiel same la multflanka influo, efikanta je la tuta hodiaŭa mondo. La plej grava trajto de la evoluo de la KREH-landoj estas la konstanta kaj flua kresko. La komunumo de la socialismaj landoj atingis la eblan plej rapidan ritmon de la ekonomia evoluo.

La 1973. jaro estis precipe rezultoplena en la agado de KREH, nome la produktivo de la socialismaj landoj en ĉi tiu jaro superis per 6%-j la antaŭan 1972. jaron.

## V A Antaŭaĵoj

Antaŭ la dua mondmilito nur 17% de la mondateno kaj 9% de la monda loĝantaro vivis en socialisma sistemo. Post la milito tiu situacio ŝanĝiĝis. De tiam la 35% de la loĝantaro komencis konstrui la socialisman ordon, sur la kvarono de la tutmonda tereno.

Hungario havas nefermitan ekonomion: 40% de nia nacia enspezo realiĝas per eksterlandkomerco. Sed ne temas nur simple pri tio, ke la komerco donas profiton. Nia lando estas malriĉa je krudmaterialoj, nia interna merkato estas malvasta. Sekve ni devas aĉeti krudmaterialojn kaj produkti tiajn varojn, kiuj estas eksport-kapablaj. Por efektiviĝi la eksportkapablon de niaj varoj, ni devas proponi bonkvalitajn, modernajn produktaĵojn por la monda merkato. Sed, por ke ni povu produkti modernajn varojn, ni bezonas ne nur krudmaterialojn, sed ankaŭ modernajn maŝinojn kaj instalaĵojn por la produktado. Kompreneble, ankaŭ ni povus plani kaj produkti tiajn maŝinojn, sed tio ne ĉiam estus utila por ni. Aldone, ankaŭ estas superflue „inventi” tiaĵojn, kiun oni jam aplikas de longe aliloke, rezultoplene. Guste pro tio la aĉeto de patentoj, respektive la teĥnika-sciencia kooperacio povas helpi je tiaj zorgoj.

Tiamaniere ekestis la pretendo, ke la socialismaj



La palaco de KREH en Moskvo

landoj kreu ekonomian kunlaboradon, kiu vastaskele ebligas la pli modernan, pli malmultekostan fabrikadon, la liveron de krudmaterialoj, faciligon de la vendo, ŝanĝon de la produktaĵoj, ktp. En 1949. okazis la formiĝo de KREH, la multflanka, kolektiva organo de ekonomia kunlaborado de la socialismaj landoj. La fondintoj estis Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj baldaŭ aligis GDR. De 1962. partoprenas en KREH Mongolio kaj de 1972. ankaŭ Kubo. En la laboro de KREH partoprenas aktive Jugoslavio. Simile ankaŭ la reprezentantoj de Vjetnama Demokratia Respubliko kaj de Korea Popoldemokratia Respubliko partoprenas en la agado de kelkaj organoj de la Konsilio.

## La evoluo de la ekonomia kunlaboro

La KREH, fondiĝinta en 1949. trairis diversajn evolu-etapojn ĝis niaj nunaj tagoj. Kvankam tiuj etapoj iomete kunfandiĝas, tamen ni povas distingi diversajn periodojn, kiuj ĉiuj havas sian karakterizan trajton de la kronologia evoluo.

La unua etapo — inter la jaroj 1949—1955 — estis la periodo, kiun ni povas nomi: evoluo de la ekster-



landkomercaj kontaktoj. Dum la unuaj jaroj de tiu etapo la KREH-landoj difinis la celon: organizi la multflankan kunlaboron kaj pere de tio helpi la membrolandojn por solidigi la socialisman ekonomian ordon, la disvolvigon de la industriigo kaj likvidi la ekonomian dependecon je la kapitalismaj landoj. En tiu etapo oni komencis ellabori la kvin-jarajn planojn. La internaciaj ekonomiaj kontaktoj evoluis pli laŭplane, la ekonomi-evoluigo mem fariĝis pli sekura.

Konsiderinda iniciato estis la teĥnika-sciencia kunlaboro inter la KREH-landoj. La socialismaj landoj donis reciproke netakseblan subtenon por evoluigi sian popolekonomion. Malgraŭ tio, ke la KREH-landoj klopodis je laŭplana produktado, en tiu etapo ofte troviĝis senproportioj kaj paralelaj produktadoj inter la diversaj industri-branĉoj.

La dua etapo de KREH-agado ligiĝas al la jaroj 1955—1957. La baza trajto de tiu etapo estas: la elformado de la produktaj interrilatoj. Dum la antaŭaĵoj iĝis evidente, ke la kunlaborado baze de komercaj kontaktoj jam ne sufiĉas, oni devas etendi la kunlaboron ankaŭ je la produkta sfero.

Tre signifoplena estis en tiu etapo la establo de la sekciaj konstantaj komitatoj. Helpe de tiuj komitatoj la grandnombra fakularo de la KREH-landoj senpere aliĝis al la ekonomia kunlaboro de la socialismaj landoj.

La tria etapo komenciĝis en 1958. kaj tiu etapo ekirigis la akordigon de la popolekonomiaj planoj. Oni metis definitive en la tagordon la bezonon de la multflanka planakordigo en la kadro de KREH. Tiel ebligiĝis, ke la socialismaj landoj reciproke atentis pri la pretendoj de aliaj landoj, kio kreskiĝis sendube la realecon de la planoj.

Nova kaj grava etapo sekvis en aprilo de 1969, en la XXIII. kunsida periodo de KREH. Baze de la ĝistiamaj spertoj, la kunsido de la konsilantaro decidis pri tio, ke oni ellaboru la kompleksan programon de la socialisma integriado ekonomia. Tiu programo estiĝis dum dujara, tre intensa laboro, per la kunlaboro de pluraj miloj da fakuloj. La Kompleksa Programo registras la evoluigajn taskojn de la integriado por 15—20 jaroj.

### *La kunlaboro de Hungario kun la KREH-landoj*

Dum la tempo de la socialisma transformiĝo, Hungario apartenis al la industrie primitivaj landoj de Eŭropo. La ĉefa branĉo de nia ekonomio estis la agrokulturo, el la industriaj sekcioj nur la maŝinindustrio estis iomete evoluinta. En la postmilita stato de nia lando, grandsignifa estis tiu efika helpo, kiu devenis el la internacia labordivido de la socialismaj landoj. Estas sendube, ke per nia propra forto ni atingus nur multe pli modestan evoluon. La socialisma ekonomia kunlaboro fariĝis fundamenta faktoro de nia tuta evoluo.

Se konsideri la plej gravajn krudmaterialojn, ni estas aŭtarkiaj nur el baŭksito. El ĉiuj ceteraĵoj ni bezonas konsiderindan importon. Baze de la internacia kunlaboro ni konstante povas kalkuli je di-



*Konstruaĵo de iama fabriko en Budapeŝto*

versaj krudmaterialoj el la KREH-landoj, samtempe ili volonte transprenas ne nur niajn industriajn varojn, sed ankaŭ la superfluan de niaj nutraĵoj.

Nia eksporto al la KREH-landoj evoluis tre rapide dum la lastaj jaroj. La volumeno de nia eksporto atingis sesoblan kvanton, kompare al tio de la 1950-aj jaroj.

Unu el la plej grandaj produktaj kooperacioj baziĝas je la hungara—soveta alumin-alumina kontrakto. Laŭ la kontrakto ni ekspedas progreskvante — en 1980. 330.000 tunojn — da alumino al Sovetunio, kie oni prilaboras ĝin kaj la pretan aluminon oni reekspedas al Hungario. Per tiu kontrakto solviĝis la kontraŭdiro, kiu montriĝis inter la baŭksitriĉeco kaj energio-malriĉo de nia patrio.

Nian ĥemian industrion helpas grandmezure la hungara—soveta interkonsento olefinĥemia. Pro la ĥemiaj bazmaterialoj, kiujn ni kontinue ekspedas al Sovetunio, ni ŝanĝe aĉetas diversajn sintezajn materialojn. Tiu novtipa produkta integriado havas avantaĝojn por ambaŭ landoj.

Hungario ne produktas person-aŭtomobilojn kaj ankaŭ estonte ne volas aranĝi je tio. Por kontentigi niajn pretendojn, ni formis kooperaciajn kontaktojn kun Sovetunio kaj aliaj KREH-landoj. En la kadro de la kooperacio ni liveras diversajn erojn kaj ekipaĵojn. Por tiuj ni ricevas pretajn aŭtomobilojn.


Nia patrio partoprenis la elkonstruon de la petrolkondukilo „Amikeco II.”, kiu alportis gravan elspezo-ŝparon, krome kreskiĝis la sekurecon de la transporto. Tiu kondukilo ekspedas jare 5 milionojn da tunoj da oleo al nia prilaborejo.

La produkta ritmo de nia maŝinindustrio konsiderinde rapidiĝis en la pasintaj 20 jaroj. Je la fino de 1970 la tuta produkto de la hungara maŝinindustrio estis 8-oble pli alta, ol antaŭ 20 jaroj. Dum la sama periodo la produkto de la ĥemia industrio altiĝis je la 20-obla.

Pasintjare oni ekfunkciigis la varmenenergia-centralon „Gagarin” apud nia urbo Gyöngyös. La laborprodukto de la energio-centralo estas 800 mil




### Proporcio de la socialismaj landoj en la monda produktado



La grafikono klare figuras la progresan partoprenigon de la soc. landoj en la monda industria produktado.

### Kresko de la nacia enspezo por unu loganto en socialismaj landoj



La figuro vidigas, ke la ekonomia evoluo de la soc. landoj inter la jaroj 1960—70 estis pli rapida, ol tiu de la kap. landoj.

KW. Fakuloj de pluraj socialismaj landoj partoprenis la konstruon.

Tre utilan kooperacion ni efektivas kun Bulgario kaj Pollando. Ambaŭ niaj kunlaboroj helpas la evoluigon de nia ĥemia industrio.

Antaŭ nelonge interkonsentis la KREH-landoj, ke

ili komune partoprenos en la konstruo de tiu 750-KW-a elektra spackondukilo, kiu el la urbo Vinjica (Sovetunio) ĝis Albertirsa (Hungario) liveros elektran kurenton. Tiu grandioza kunlaboro ebligos la unuigon de la bulgara, ĉeĥoslovaka, pola, hungara kaj soveta energio-sistemo, kiu per la estiĝontaj 160.000 MW da laborprodukto fariĝos unu el la plej grandaj energiosistemoj de la mondo.

El inter la KREH-landoj, atomaj energio-centraĵoj laboras jam en Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, GDR kaj oni nun preparas la funkciigon de simila atoma centralo en Bulgario. Ankaŭ en nia lando oni komencis la preparadon por konstrui tian atoman energio-centralon. Laŭ anticipaj planoj oni intencas provizi la KREH-landojn ĝis 1990. per ĉ. 150 atomreaktoroj. Konekse al la efektiviĝo de tiu plano, nia patrio rezultoplene plenumas sian taskon en la internacia ekonomia organizo: Interatomenergo.

La riĉaj tradicioj de la hungara telekomunikadteĥnika industrio kaj ties evoluigaj rezultoj ebligas nian intensan partoprenon en la internacia kunlaborado. La 70 % de niaj produktaĵoj ni eksportas al la socialismaj landoj. En la sekvaj jaroj nia industrio konsiderinde partoprenos la fabrikadon de koloraj televid-aparatoj.

### Ceteraj kontaktoj

El la principoj de la socialismo sekvas, ke la socialismaj landoj ne strebas izoligi. Kontraŭe. Surbaze de la reciprokaj avantaĝoj ekonomiaj ili vastigas sian ekonomian kontakton kun ĉiuj landoj de la mondo, sen konsidero pri ilia socia ordo. Tiamaniere la socialisma internacia labordivido fortikigas la materian bazon por la paca kunekzisto de la du mondsistemoj.

Kiu ajn lando povas aliĝi al la ekonomia komunumo de la socialismaj landoj, se ĝi entreprenas plenumi la devojn, difinitajn en la ĉarto de KREH. Post la publikigo de la Kompleksa Programo la internacia interesiĝo grandmezure kreskis pri la ekonomia integrado de la KREH-landoj.

Antaŭ nelonge validiĝis tiu interkonsento, laŭ kiu Finnlando partoprenos en la okcident-eŭropa Komuna Merkato. Tuj poste Finnlando proponis al la KREH-landoj establon de duflankaj doganpaktoj. La kompetenta miksa komitato akceptis ĉijare laborplanon, kiu antaŭplanas la esploradon de la kunlaborado inter la KREH-landoj kaj Finnlando, speciale sur la terenoj de maŝinproduktado, ĥemia industrio, trafiko kaj scienc-teĥnika kunlaborado. En la komenca periodo de la kunlaboro inter Finnlando kaj Hungario havas specialan signifon la evoluigo de niaj ekonomiaj kontaktoj. La efektiviĝon de la paca kunekzisto inter niaj landoj certe helpas krom la komuna intereso ankaŭ la konscio kaj sento de la parenceco.

István LÁSZLÓ



# Industrion provincen!

## Rezultoj de dekkvinjara industria evoluo

### *Paseo*

La hungara industrio havas konsiderindan paseon. La XIV-a kaj XV-a jarcentoj signifas la komencon de la organizita industria vivo en la kadro de la pli kaj pli fortiĝantaj gildoj. Tamen pro la centkvindek-jara osmana okupo, la postaj enlandaj perturboj, la Habsburga subpremo de la lando kaj entute la rezisto de la feŭda sistemo kontraŭ ĉiu modernigo, la vera industria evoluo startis nur en la lasta kvarono de la XIX-a jarcento. La kreskado estis interrompita de la unua mondmilito, tamen en 1925 la nombro de la laboristaro en la diversaj branĉoj de la industrio superis ducent mil. Gvidaj branĉoj estis la ŝtalo- kaj maŝino-industrio, krome la teksa kaj la manĝaĵa industrioj.


### *Komencoj de la socialismo. Malekvilibro*

Post la dua mondmilito, jam inter socialismaj cirkonstancoj, la evoluo plirapidiĝis. La nombro de la laborantaro de la industrio en 1949 estis malpli ol unu miliono, dum en 1960 preskaŭ unu miliono septcentmil. Tamen la evoluo pli malpli konservis unu malavantaĝon socian de la antaŭaj tempoj: la industrio estis maksimume koncentrita en Budapeŝto, kaj granda parto de la lando havis nenian industrian. En 1957 la budapeŝta laboristaro formis preskaŭ duonon de la tutlanda laboristaro.

Pro tiu ĉi malekvilibro la laboreblecoj de la loĝantaro estis tre malsamaj en diversaj regionoj kaj ankaŭ la sociaj kaj municipaj provizoj estis tre diversnivelaĵoj.

### *Partia decido*

Konsiderinte ĉi tiun nesanan situacion, en 1958 la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Partio Laborista decidis pri la sistema laŭregiona evoluigo de la industrio, ke la ekzistantaj malavantaĝaj diferencoj laŭgrade malkresku kaj eliminiĝu. Estis



*Nova uzino en provinco — foto de János Eifert*

decidite estigi novajn uzinojn, laborejojn pli proporcie, lokigitajn en ĉiuj regionoj de la lando. Dum la pasintaj dekkvin jaroj gravaj rezultoj estis atingitaj.

### *Malcentralizi sed ne dispecetigi*

En 1957 la relativa nombro (en procentoj) de la laboristaro estis la sekva:

Granda Ebenaĵo*	12,2
Norda Hungarujo	13,6
Norda Transdanubio**	16,8
Suda Transdanubio	7,1
Departemento Peŝta	4,7
Budapeŝto	45,6
Sume	100,0

Estas menciinde, ke ekzemple la loĝantaro de Budapeŝto tiutempe ne atingis 18 procentojn de la tutlanda loĝantaro.

La plej gravaj malhelpoj kontraŭ la industriigo de la postrestintaj regionoj estis la malaltnivela vojreto (infrastrukturo) kaj la manko de faklaboristoj. Krome, por kontentigi la teknikajn kaj ekonomiajn postulojn, novaj, modernaj granduzinoj estus nece-

\*Granda Ebenaĵo: Meza kaj orienta parto de Hungario.

\*\*Transdanubio: Parto de Hungario okcidente de Danubo.



saj. Sed en tiu tempo la financaj kaj materiaj kapabloj de la lando tion permesis nur tre malaltgrade. Simplaj kaj malmultekostaj solvoj estis bezonataj, se oni deziris fari entute ion por la industriigo de la provinco. Tiel okazis, ke neuzataj administraciaj domegoj, likviditaj muelejoj kaj aliaj objektoj estis transformitaj en industriajn uzinojn. La fabriko de elektraĵoj Remix en urbo Szombathely, la kablofabriko en Szeged, la fajlilo-fabriko en Kecskemét, la vestaĵfabrikoj en Ózd kaj Nyiregyháza estis instalitaj en tiaj konstruaĵoj. Tio estis heroo epoko de la industriigo de la provinco.

Estis multaj diskutoj kiel interpreti la malcentralizon.

Pluraj volis estigi proprajn fabriketojn por ĉiu vilaĝeto, tamen la ĝusta vojo povis nur esti krei plurajn, bone elektitajn industriajn centrojn kaj plifortigi la industrion de la provincaj urboj en la industrie postrestintaj regionoj. Dispecetigo anstataŭ sana malcentralizado estus tute kontraŭ la leĝoj de la ekonomiko.

### Industriigo ĉirkaŭ Budapeŝto?

Alia miskompreno de la partia direktivo malkovrigis, kiam pluraj budapeŝtaj entreprenoj provis tiel „malcentralizi” sian industrion kaj „evolui la provincon”, ke ili instalis novajn uzinojn en la periferiaj vilaĝoj ĉirkaŭ Budapeŝto, kiuj formis ja laŭjure regionon provincon, sed fakte apartenis al Budapeŝto. Tia kompreno evidente ne malŝarĝis la ĉefurbon, nek servis la industriigon de la provinco. Ĝi malkreskigis la laborforto-bazon de la budapeŝta industrio, kaj samtempe plifortigis la fluon de la veraj provincoj al la ĉirkaŭbudapeŝtaj sidlokoj, malfaciligante la taskojn de la municipa provizado. Vidante tion, jam en 1962 estis faritaj decidoj kontraŭ la ĉirkaŭbudapeŝta industrio-evoluigo.

Pri la najbaraĵo de la ĉefurbo estas multe pli oportuna solvo, se tiea laborkapabla loĝantaro laboras plu en la budapeŝta industrio, sed la trafiko-reto estos tiel plibonigita, ke veturtempo de loĝejo ĝis laborloko ne superu 40—50 minutojn. Tiagrada pendolado ĉirkaŭ grandurboj jam estas natura kaj necesa fenomeno ĉie en la mondo.

### Komuna fortostreĉo

Entute la dekkvinjara industriigo de la provinco povas esti rigardata kiel tre rezulthava. Tion karakterizas kelkaj nombroj el 1973 esprimantaj laŭprocente la laboristaron de la jam menciitaj ĉefaj regionoj:

Granda Ebenaĵo	19,8
Norda Hungarujo	13,6
Norda Transdanubio	19,0
Suda Transdanubio	9,8
Departemento Peŝta	5,8
Budapeŝto	32,0
Sume	100,0

Dum dekkvin jaroj en la Granda Ebenaĵo la nombro de la laboristaro pligrandiĝis per ducentmil. En certaj subregionoj la laboristaro kvarobliĝis: Konsiderinda industrio estiĝis en tiaj agrarurboj, kie neniam ekzistis antaŭe.

Tamen ne pensu, ke la industriigo tuŝis nur la neevoluintajn regionojn. En urboj, antaŭe karakterize pezindustriaĵoj, bezonantaj preskaŭ nur virojn, estiĝis uzinoj malpezindustriaĵoj, ofertantaj grandskalan laboreblecon por virinoj kaj tiel kontribuantaj al la plialtigo de la loka vivnivelo.

La industriigo de la provinco povis esti tiel sukcesa nur tial, ĉar la centraj landaj aŭtoritatoj zorgis konsideris la diversecon de la lokaj cirkonstancoj, specialaĵoj, kaj multe apogis sin al la lokaj iniciatoj. La industriigo kelkloke fariĝis vera amasovado, tia publika afero, kiu vekis interesigon en larĝaj tavoloj de la loĝantaro. La lokaj komunumaj konsilantaroj ĉiamaniere helpis la naskigon de la novaj uzinoj. Ili disponigis konstruaĵojn, municipajn provizojn, konstrukapaciton. Ili oferis loĝejojn por la venemaj fakuloj, eĉ siajn ekzistantajn uzinetojn transdonis al la novaj por helpi ties starton. Ili evoluigis la municipan vojreton servantan al la novaj fabrikoj.


### Firma bazo por plua evoluo

Komence estis problemoj pri la ekonomieco de la novaj uzinoj. Tion kaŭzis evidente la manko de la rutinigita laboristaro kaj multaj aliaj cirkonstancoj. Tamen en kelkaj jaroj tiuj malavantaĝoj laŭgrade malaperis kaj la bone gvidataj uzinoj iĝis ekonomiaj, profitodonaĵoj.

La industriiga politiko entute povas esti juĝita kiel sukcesa kaj de historia signifo. La laŭplana industriigo de la provinco grandmezure helpis moderigi la diferencojn en la vivniveloj kaj cirkonstancoj de la loĝantaro en la diversaj regionoj de la lando. Ĝi kreis vastan kaj firman bazon por intensa pluevoluigo de la tuta hungara industrio.

Kompilita de d-ro Ottó HASZPRA

Béla Stettner: Ex libris





# La hungara socialisma agrokulturo

## Historio

La historion de la socialisma hungara agrokulturo oni devas komenci en la printempo de 1945, per la granda agrarreformo, kiu fine ĉesigis ĉe ni la duonfeŭdalajn grandbienojn, latifundiojn, fideikomisojn kaj dividis la teron inter tiuj, kiuj ĝin mem kultivas, t.e. inter la kampuloj. La hungaraj kampuloj vivis ĝis tiam grandparte vivon subhoman; kiel diris maljuna kampulo, suferinto de tiuj tempoj: „En la antaŭa, hom-turmenta socio la kamparanoj estis klaso tretita en la koton”. La reformo eksproprietigis 2.8 milionojn da hektaroj kaj dividis ilin inter 642 000 pretendantoj. La ricevita areo estis, laŭ landa averaĝo, po 2.9 hektaroj por persono.

Sajnis evidenta, ke tia dispartigo levis ja la kamparanojn sur pli homan nivelon, tamen, ĉar ĝi konsistis el „zonrimen-parceloj”, ĝi ebligis nur primitivan, etbienen kultivadon kaj rendimenton nekontentigan por la nacia ekonomio. Tial HKP kaj la progresemaĵoj alipartiaj volis influi la kampulojn tiel, ke ili unuiĝu en produktaj agrarkooperativoj (de nun: „agrar-koopoj”). En 1948 komenciĝis grandskala propagando kaj movado kun tia celo, kaj ankaŭ pluraj agrar-koopoj estis organizitaj. Sed ne mankis eraroj kaj mispaŝoj: neglekto de ĉedomaj kultivaĵoj, izoligo de iamaj malriĉuloj disde la pli bonhavaj kampuloj, ofendo de la Leninaj principoj de laŭgradece kaj memvoleco ktp. krome la tuto estis tro frua: mankis por ĝi kaj la ekonomiaj kaj la sociaj kondiĉoj. Tial ĝi kondukis al konfliktoj, perforto, krizo (pri tio oni povas legi E-e en la „Dudek horoj” de Ferenc Sánta).

Antaŭ 10—12 jaroj, en multe pli oportuna situacio komenciĝis la transorganiziĝo de la hungara agrokulturo per grandnombra estiĝo de agrar-koopoj. Kaj tiun organizadon kronis plena sukceso, tiel ke hodiaŭ ni povas jam paroli pri hungara socialisma agrokulturo. Historie tiuj 10—12 jaroj estas tre mallonga tempo, tamen ni povas jam vidi la naskiĝon kaj fortiĝon de tute nova kamparana vivoformo.

## La agrokultivaj kooperativoj

La agrar-koopoj estas la ĉefa bazo de la nuntempa agrokulturo en Hungario. Al ili apartenas ankaŭ la t.n. „ĉedomaj kultivaĵoj”, kiujn posedas private la membroj de la agrar-koopoj. Oni do povas distingi en la koopoj „komunaĵon” kaj „ĉedomajaĵon”;


## Agrokultiva kooperativo

tiuj du specoj de kultivaĵoj harmonie kunfunkcias inter si, ĉar la ĉedomajaĵoj estas ĝis nun gravaj faktoroj de la agrokultura produktado.

La agrar-koopoj mastumas nun sur 78% de la agrokultura areo de la lando, sur ĉ. 6 milionoj da hektaroj, la ĉedomajaĵoj sume havas areon de 0.75 miliono da hektaroj. En la agrar-koopoj laboras 78% de la aktivaj agrokulturistoj kaj 18% de ĉiuj laborantaj en la popola ekonomio.

En la lastaj jaroj grandmezure progresis la meĥanizo de la agrokultura produktado en la koopoj. En pluraj fakoj efektiviĝis la kompleksa meĥanizo. Tion sekvis la elformado de modernaj produktosistemoj, kiuj konsistas el plej altevoluaj tekniko kaj produkt-organizo. La areo, kie tia produkto-sistemo realiĝis, superas duonmilionon da hektaroj. En bredado unue la kortbird-bredado, poste la porkobredado aplikis la novan produktosistemon, kaj en la bovobredado ĝi estas nun disvolviĝanta. La pli alta teknika nivelo kompreneble postulas ankaŭ pli grandan fakspertecon. En la nutraj-produktado nun laboras pli ol 25 000 homoj studintaj universitaton aŭ ĉeflernejon, 40 000 homoj kun mezgrada instruiteco kaj super 200 000 faklaboristoj.

Krom la komunaĵo de la agrar-koopoj, kiel jam menciite, ne estas neglektebla la produktado de la ĉedomajaĵoj kaj aliaj etbieno. La bruttoproduktado de la agrokulturo dividiĝas tiel, ke ĝiaj 61% venas el la grandaj komunaj kultivejoj, 22% el la ĉedomajaĵoj kaj 17% el la aliaj etbie-




noj. El la bovoj 36%, el la kortbirdoj 54%, el la ĉevaloj 40% troviĝas en ĉedomajaĵoj aŭ etbieno. Krome, en la plimulto de la agrar-koopoj, konsiderinda parto, eĉ duono de enspezo estas perlaborata de la membroj en la ĉedomajaĵoj. Tio, tamen havas ankaŭ malavantaĝon: la anoj plurloke rigardas multe pli grava la ĉedomajaĵon ol la komunaĵon, kaj konsumas sian forton per la ĉedomaja laboro, kiu apenaŭ estas meĥanizita. Tial aŭ ili venas lace al la komuna laboro, aŭ tie ŝparas sian forton por la ĉedomaj klopodoj. La solvo, multloke jam aplikata, estas, ke la komunaĵo helpas la ĉedomajaĵojn: la maŝinoj de la agrarkoopoj kultivas ankaŭ la ĉedomajn areojn. La komunaĵo helpas ankaŭ en la vendado de la ĉedomaj bredataĵoj bestoj.

## Rezultoj.

Sekve de la florado de la agrokulturo plialtiĝis la vivnivelo: la nutraj-konsumo estas pli granda per 75% ol antaŭ la liberiĝo. La ekvivalento de la unutaga konsumado estas po 3200 kalorioj por persono, kio estas tre granda evoluo kompare al la antaŭa. La strukturo de la nutraĵo tamen ankoraŭ ne estas tute kontentiga: oni devas pliigi la proporcion de la albuminoj (nun 100 gr.), precipe tiun de la best-originaĵoj (nun 43 gr.), kaj malpliigi la konsumadon de la karbohidratoj kaj precipe de la grasoĵoj. Fakte, oni jam komen-





*Maŝinoj sur la kampo*

cas publike admoni kontraŭ la nesana trograsiĝo kun la modifita biblia citaĵo: „Ni estas pesitaj, kaj troviĝas tro pezaj.”

La rapidritma evoluo ebligas ankaŭ tion, ke 25%-ojn de la produktitaj nutraĵoj ni eksportu alilanden.

#### *Sociaj ŝanĝoj.*

La komuna laborado, la meĥanizita kultivado radike ŝanĝis la sociajn cirkonstancojn de la kamparanaro. Unue, tute ĉesis la akirema adoro de la tero, la t.n. ter-malsato. La rangon nun donas la moderna loĝejo, kun banĉambro, fridujo, lavmaŝino, centrifugilo, la modaj vestoj, televido, kaj, lastatempe pli kaj pli, la privata aŭto. Kaj tion oni povas juĝi justa, ĉar la monon necesas por la akiro de tiuj havaĵoj oni povas lukri nur per diligenta laboro en la komunaĵo kaj ĉedomaja. Tio estas konforma al la socialisma salajrado: ĉiu laboru la sia kapablo kaj estu dotata laŭ sia laborvaloro.

Estas konate, ke la kamparanaro ne estas unueca klaso; ankaŭ en Hungario ĝi estis dispartiĝinta. Ekzistis „grandaj mastroj”, t.n. „grasaj kampuloj” aŭ „paŝa-kampuloj”, mezgrandaj mastroj, etmastroj kaj agrarproletoj. La dispartiĝo inter tiuj tavoloj estis akra, preskaŭ kasta, ekz-e „subranga” edziĝo aŭ edziniĝo estis preskaŭ neimagebla. La spuroj de ĉi tiu kasteco ne ĉie malaperis ankoraŭ. En la unuaj tempoj de la agrarkoopoj, kiam ankoraŭ multe diferencis la vivniveloj de la iamaj bonhavuloj kaj iamaj nenihavuloj, la antaŭaj ĉe tagmanĝo fortiriĝis disde ĉi lastaj, por ke ĉi tiuj ne vidu la pli riĉan enhavon de illa tornistro. De tiam ĉi tiu „tornistra izoliĝo” tute ĉesis kun la ĝenerala altiĝo de la vivnivelo kaj kun la

nutraj-abundo. Prefere oni povas vidi, ke oni grupiĝas laŭ laborsferoj; multaj koopanoj ja akiris dume atestilon, diplomon pri muntista, maŝinista, plantista, bredista fakscio.

Tamen, en pluraj koopoj la malnovaj diferencoj de deveno kaj bonhavo plu vivas ankoraŭ, kaj ne nur en memoro. Precipe malfacile cedas la antipatio de la iamaj agrarproletoj kontraŭ tiuj koopanoj, kiuj sisteme kiel mastroj laborigis dunglaboristojn kaj bienservistojn. Sed tian rankoron sentes nur homoj pli-ol-45-jaraj kaj en la sekvanta generacio certe malaperos la spuroj de la iama malegaleco.

Koncerne la „miksgedziĝojn”, en kelkaj vilaĝoj ankaŭ nun validas la apartiĝo: „subranga” geedziĝo okazas nur malofte. En aliaj vilaĝoj la iam bonhavaj kaj iam senhavaj familioj jam amikadas inter si kaj iliaj idoj geedziĝadas inter si senobstakle.

Gravan ŝangon oni povas vidi en la pensmaniero de la agrarkoopanoj. Oni ridas pri la iama malamika propagando, ke la koopa vivo senigas la homojn disde la libereco kaj la ebleco de libera decido. En relative mallonga tempo, la homoj ne nur amikiĝis al la koopa vivo, sed kvazaŭ kunfandiĝis kun sia koopo. Precipe bone influis ilin en tiu direkto la aŭtonomio de la agrar-koopoj kaj la koopa demokratio. La koopo-gvidantoj ĝenerale emfazis en sia landa konferenco, ke multe pli grava eĉ ol la bonaj ekonomiaj rezultoj estas tio, ke la koopanoj efektive partoprenu en la decidoj pri la koopaj aferoj, ke kiel eble plej multaj koopanoj aktivu en la diversaj koopaj komisionoj, kaj ke ĉi tiuj korporacioj laboru memstare en sia sfero. Tiel povas okazi, ke la malnovan privat-proprietulan pensmanieron anstataŭu la nova, komun-proprietula vidmaniero.

Evidentege, la kamparana vivo fariĝis pli noma. Ĉesis la penego pelata de ter-akira avido. La koopaj familioj nun klopodas akirigi per siaj infanoj pli altan instruitecon: ĉi tiuj ellernas fakon, vizitas mezlernejojn, studas en universitato. La pli granda zorgado pri la infanoj estas unu el la ĝojindaj trajtoj de la nuna kamparana vivo. Sed la koopanoj povas pli multe zorgi ankaŭ pri si mem. Kiel individuaj kultivistoj ili laboregis de eklumo ĝis mallumo, nun antaŭ ili „malfermiĝis la mondo”: efektive ili fariĝas landirantoj, eĉ mond-irantoj.

La membroj de la koopoj ĝenerale malplimultiĝas: la maljunaj pensiĝas, la junulojn parte altiras la industrio. Tamen la produkto-kvanto pligrandiĝas dank’ al la pli kaj pli perfekta meĥanizo kaj kemiizo. La nove aliĝantaj junuloj estas plejparte fakinstruitoj. Komence ili vidas en la agrarkoopo nur eblon de lukro, mon-akiro, sed poste ili jam sentas ĝin sia propra kiel produktan, proprietan kaj socian komunajon.

Multo estas ankoraŭ farenda, por ke ĉiuj koopoj atingu la produktonivelon, teknikon kaj pensmanieron de la bona plimulto. Sed oni povas diri, ke la hungara agrikulturo nun jam progresas marŝante antaŭen sur glate pavimita vojo.

Komp. K. KALOCSAY

## Hungardevenaj araboj en Nubio

*Nia revuo jam raportis, kaj serioze kaj humure, pri la ĉie-estado de hungaroj, sed certe surprize estas, ke hungaroj troviĝas ankaŭ en Nubio. Juna hungara scienculo László Kákósy, konata egiptologo, raportante pri la esplorlaboroj en Kasr Ibrim, kiujn faras tie la ekspedicio de la angla profesoro J. M. Plumley, mencias interesan trovaĵon: Plumley trovis arablingvajn tekstojn, laŭ kiu en 1527, kiam Egiptio apartenis al la turka imperio, oni translokis en Nubion bosnianojn kaj ankaŭ hungarojn. Kaj fakte, kelka parto de la Nubia loĝantaro ĝis nun nomas sin magaraboj (hungaraboj) kaj gardas la memoron de tio, ke iliaj prauloj venis el Hungarlando. Prof. Kákósy rakontis, ke posedanto de bazaro en Assuan interesiĝis pri lia nacieco, kaj eksciinte, ke li estas hungaro, tre varme lin salutis kiel parencon. Espereble oni plu esploros ĉi tiun aferon historie kaj lingvistike.*

P. Balkányi



William Auld:

## Kiel mi amikigis kun Imre, Sándor, Mihály, k. a.

Fine de 1946 mi revenis, 22-jara, post kvarjara milita servado, al mia hejmlando. Dum preskaŭ dek jaroj mi konis — laŭ lernolibra nivelo — Esperanton, tamen mi estis analfabeta pri la literaturo de tiu lingvo, kaj absolute neniam havis eĉ plej malgrandan kontakton kun iu ajn esperantisto. Malŝtreĉigante pro la konstato, ke mi travivis la buĉadon, kaj ke bela paca estonteco — mi supozis — etendiĝas antaŭ mi, mi decidis esplori pli profunde la internacian lingvon. Mi do mendis, laŭ la titoloj en katalogo, grandan pakaĵon da libroj, kaj eklegegis.

La unua tralegita libro estis romano de Remarque, la dua estis „Infero” el la Dia Komedio de Dante, la tria estis „La tragedio de l' homo” de, kompreneble, Madách. Jes, hodiaŭ mi povas skribi „kompreneble, Madách”; sed en 1946, kvankam kiel edukita anglalingvano mi tamen bone sciis pri la furorinta Remarque kaj la klasika Dante, kiel edukita anglingvano mi nepre ne sciis eĉ la nomon de la hungara poeto aŭ la titolon de lia granda verko. Kiel mi sciis? Aŭtoritata, 350-paĝa „Historio pri okcidenta literaturo”, kiun mi posedas, dediĉas al la hungara literaturo precize... tri liniojn (sola mencio de Petőfi). Kaj tio estas tri linioj pli, ol la plimultaj anglalingvaj literaturhistorioj dediĉas al la literaturo de Hungarujo.

Mi do mendis la esperantan tradukon plejparte hazarde, pro la interesa titolo kaj lakona kataloga indiko ke „temas pri epika poemo iom simila al la ‚Paradizo perdita’ de Miltono”. Kaj mi ravigis. Kaj mi miris, ke tiu ĉefverko estas nekonata en Britujo. (Post kelkaj jaroj mi efektive sukcesis trovi, polvokovritan en biblioteko, anglan tradukon, faritan de iu vortbuĉisto — verŝajne bonintenca — kies fuŝaĵo, se iu entute legis ĝin, sukcesus nur kompromiti la originalon.)

Nelonge poste mi renkontis mian unuan kleran esperantiston, kaj al li mi menciis mian raviĝon pri Madách. Mi bone memoras, kiel eklumiĝis entuziasme liaj okuloj, kaj li diris: „Ho, jes! Kaj Petőfi, ĉu ne, kaj Ady, kaj Arany...” Vidante laŭ mia esprimo, ke mi ne komprenas, li demandis, „Ĉu vi ne legis ‚Hungaran antologion’? Ne?” kaj senplue li deklamis:

Banas sin la luno en ĉiela maro,  
Revas la rabisto meze de arbaro, ktp.

Tiu amiko, Reto Rossetti, havas fortan memorkapablon. Tiun posttagmezon mi aŭdis kun miro kaj profunda plezuro dekon da hungaraj poemoj; reveninte al sia hejmo, li enpoŝtigis al mi pruntedone la „Hungaran antologion”; kaj tiel malfermiĝis al mi tute nova tereno, kies ekziston mi antaŭe eĉ ne supozis.

Dum kelkaj jaroj, de tempo al tempo renkontiĝis amika triopo — mi, Rossetti, Francis — kaj tranoktadis kune, trinkante kafon, fumante senpaŭze, babilante kaj deklamante. Ĉiu laŭdezure leviĝis, iris al la bretaro, prenis libron, eklegis, dum aŭskultis la aliaj kaj faris poste komentojn aŭ simple silentis kontente. La leganto mem spertis tiajn noktojn, espereble? Neniu tranoktado estis kompleta por ni sen multaj hungaraj verkoj, tradukitaj plejofte de la mirinda Kalocsay. Efektive, tiel amataj fariĝis al ni diversaj hungaraj poetoj, ke ni baldaŭ aludis al ili per iliaj antaŭnomoj. Probable aliaj popoloj estas pli formalaj ol ni skotoj; sed ĉe ni, ekuzado de antaŭnomoj estas normala inter amikoj, kaj ŝajnis al ni normale diri ekzemple: „Laboru, homoj! kiel Sándor instigas:

Sed ho, ĝis tiam halt' ne estu,  
Sed estu lukto kaj fervor!”

Kio nin aparte impresis ĉe la hungaraj verkistoj, tio estis profunda intelekta kvalito, kiun ni subsentis en preskaŭ ĉies verkoj; en ekzemple la angla literaturo ni ion similan ne trovis. Kiam iu neesperantista idioto foje diris, „La hungara? — cigana kulturo!”, mi ankoraŭ memoras, kiel Rossetti preskaŭ apopleksiis. Montriĝis, ke la dirinto eĉ unu vorton el la hungara literaturo neniam legis: li estis, ho ve, tipe angla (sed mi supozas, ke ĉiu popolo havas kelkajn idiotojn. Mi aŭdis simile sensciajn stultaĵojn pri la literaturo esperanta.)

Kompreneble, ni ĉiuj trovis proprajn plejŝatatojn. Francis, kies artformo antaŭ ĉio estas la novelo, projektis volumon: „La dek plej bonaj noveloj en la mondo”, kaj insistis, ke „Malriĉaj homoj” de Zsigmond Móricz estas unu el tiu granda deko. Rossetti neniam ĉesis surdigi nin per laŭdado de la novelkolekto „Norda vento” de Karinthy. Al mia speciala gusto aparte plaĉis, ĉu proze ĉu poezie, la luksa lingvaĵo de Babits. Krome, multaj unuopaj poemoj fariĝis intimaj posedaĵoj miaj. Moto kaj titoligo de unu el miaj propraj poemaroj, „Unufingraj melodioj”, fariĝis verso de Ernő Szép:

Per unu fingro klavojn trapromeni.


Al la poemo, el kiu mi ĉerpis tiun verson, mi faris la plej altan omaĝon, kiun mi kapablas: mi tradukis ĝin formfidele, laŭ la esperanta versio, en la skotan lingvon. Unu alian poemon mi traktis same: „La nokto de libertempa soldato” de Oszkár Gellért. Pro kopirajtaj kaŭzoj mi neniam eldonis tiujn tradukojn, tamen ili estis multe admirataj, interalie de du ĉefaj nuntempaj skotaj poetoj, al kiuj mi montris ilin.

Neniam forpasis mia amo al la hungara literaturo. Dank' interalie al la brila revuo „Hungara vivo”, kiu aperadis de 1961 ĝis hodiaŭ, mi povis konatiĝi ne nur kun la klasikaĵoj kaj la antaŭmilitaj verkoj, sed ankaŭ kun la plej lastaj atingoj de la moderna epoko: Sándor Weöres, Mihály Gergely, László Nagy kaj lia edzino Margit Szécsi, Károly Jobbágy, Mihály Ladányi, kaj multaj, multaj aliaj. Dank' al la eldonejo Corvina mi povis legi ĉiam novajn hungarajn verkojn, inter kiuj elstaran pozicion por mi havas la brila romano „Dudek horoj” de Ferenc Sánta — sed mi nepre devas menciigi ankaŭ la longe atenditan kompletan poemaron de mia malnova amiko Sándor, kaj funde reviziitan eldonon de tiu mia unua, okulmalferma, hungaraĵo „La tragedio de l' homo”.

En angla lingvo mi posedas du volumojn tradukitajn en la hungara. En Esperanto mi posedas 26 volumojn el la hungara, kaj tio ne enkalkulas la centojn kaj centojn da verkoj tradukitaj aperintaj en diversaj kolektoj kaj revuoj. Mi kelkfoje aŭdis, ke „Esperanto estas malamiko de la naciaj lingvoj”. Kia renverso, kia honta renverso, de la vero! Male, Esperanto estas plej forta amiko de la nacioj, kaj precipe de la nombre pli malgrandaj nacioj, precize, ĉar pere de Esperanto oni povas pli funde kaj pli intime ekkoni la valorojn de fremdaj popoloj.

Mi konfesu ion. Pro mia interesiĝo pri la hungara literaturo pere de Esperanto, mi iam ekstudis la belan hungaran lingvon. Mi baldaŭ konstatis, ke kvankam mi eble kapablus mendi manĝaĵon en restoracio, mi neniam kapablus alproprigi la hungaran sufiĉe profunde por ĝuste apreci la literaturon. Sed per la brilaj esperantaj tradukoj, faritaj de hungaroj en belegan Esperanton, mi almenaŭ povis ricevi fidindan superrigardon de la hungara literaturo. Kaj ekami ĝin. Mi estas pli kompleta homo, kaj — ĉar mia profesia fako estas ĝuste la literaturo — pli sperta fakulo, dank' al la hungaraj esperantistoj.





Zoltán Kodály kun sia edzino — foto de Károly Gink

La kurantan jaron ni povus nomi printempo de plivastigo de hungaraj—japanaj interrilatoj. La reprezentantoj de la hungara kulturo sukcese konkeris la japanan publikon, pluraj japanaj delegacioj estis akceptitaj en Hungario, ankaŭ la komercaj, ekonomiaj kaj fremdultrafikaj kontaktoj montras tendencon de ĝojiga evoluo.

Komence de la jaro en Tokio estis aranĝita Petőfi-vespero, okaze de la apero de libro je la honoro de la 150-a naskiĝdatreveno de Petőfi. Tiu libro, zorgata de la eldonejo Kobunsa enhavas elektitajn poemojn kaj studojn, kaj estas la unua ĉi-rilata verko pri la vivo kaj verkado de nia poeto. La literaturan vesperon, aranĝitan de japana kultura asocio funkcia sub la egido de Japana Socialisma Partio — kaj de la hungara ambasadoraro malfermis profesoro Macumae Ŝigejoŝi.

Prezentiĝis ankaŭ la hungara popolaro en Tokio, okaze de ekspozicio de Japana Belarta Asocio. En la kadro de la ekspozicio kaj foiro estis prezentitaj folkloraj produktaĵoj de Aziaj landoj. Eŭropon reprezentis Svedio, Danio kaj Hungario; ni ekspoziciis brodaĵojn el Kalocsa.

La plej grandan sukceson atingis nekontesteble la Stata Koncerta Orkestro, gastrolinta unuan fojon en Japanio. La koncert-rondiro komencis la 5-an de Marto en Tokio; Osaka, Takamatsu, Sendai kaj Marioka estis la sekvintaj stacioj de la sukceso.

Dum la hungara kulturo estis grandskale prezentata en Japanio, pluraj japanaj delegacioj alvenis en Hungaron. Inter ili grupo da muzikpedagogoj de la „Kodály—Instituto pri Estetiko kaj Edukado” el Tokio, kiu partoprenis diversajn fakajn programojn, kaj en urboj Pécs, Komló kaj Kecskemét ili studis la muzikinstruan metodon kreitan kaj aplikitan de Kodály. Esprimiĝis la interesiĝo de la malproksimorienta lando ankaŭ rilate la Hungarian infanĝardenan edukadon; la alia grupo de la delegacio studis ĉi-rilatajn problemojn.

Fine de Aprilo estis subskribita hungara—japana kultura interkonsento pri reciprokaj studvojaĝoj de junaj esploristoj, specialistoj kaj pri ŝanĝo de ekspozicioj kaj folkloraj ensembloj. La lasta sciigo pri la vizito de István Szurdi, ministro pri interna komerco en Japanio, subtrekis la evolutendencon de niaj interrilatoj: la hungaran ŝtatistoj akceptis ministroj, Nakasone, Ohira kaj Takabajasi, kaj dum iliaj traktadoj estis pridiskutitaj demandoj pri la disvastiĝo de ekonomiaj, komercaj kaj fremdultrafikaj interrilatoj de la du landoj.

\*

*En la Esplor-Instituto de Elektra Energio oni faras sukcesajn eksperimentojn pri la utiligo de la energirezervo de sunlumo. Tie oni esploras, kiamaniere ni povus plivastigi la eblojn por ricevi el la natura trezoraro utiligeblan energio-donanton por la popolekonomio.*

*Rezulte de la du jarojn daŭrinta eksperiment-serio oni jam pretigis t. n. sunbateriojn, kiuj transformas la lumenergion de Suno je elektra energio, rezervebla en akumulatoroj. Okaze de forta sunbrilo unu kvadrata metro faco de la sunbaterio donas daŭre energion de 100 vatoj.*

\*

Profesoro Gyula Germanus estis invitita de Alĝeria ministro pri instruado por fari prelegon pri la kriminala juro de Islamo, okaze de la Islama Scienca Konferenco.

Entrepreno de Internacia Komerco „Ferunion” gajnis konkurtraktadon en Alĝeria, en valoro de preskaŭ unu miliono da dolaroj, kaj la negocan kontrakton — kiu estas ĝisnune la plej granda tiaspeca interkonsento de la entrepreno — fine de marto per subskribo oficialigis la kontraktantaj partioj: reprezentantoj de Ferunion kaj tiuj de Alĝeria Sportministerio. Laŭ la kontrakto Ferunion ĉi-jare liveros en Alĝerion diversajn aluminiajn konstruaĵojn, fenestro-, kaj pord-instalaĵojn, kradojn kaj vitrajn varojn. En la jaro 1975 estos aranĝataj en Alĝerio t.n. Mediteraneaj Sportludoj. Apud la olimpia stadiono konstruita pli frue laŭ hungaraj projektoj, oni konstruos olimpian vilaĝon kun banejoj, konkursejoj kaj aliaj sportestablaĵoj. La Alĝeria sportministerio anoncis konkurson por projekti kaj produkti la aluminiajn instalaĵojn de la konstruaĵoj. Tiun konkurson gajnis la hungara entrepreno el inter ok konkurstantoj. La menditajn fabrikaĵojn produktos „Fém-munkás Vállalat” (Metalprilabora Entrepreno) kaj liveros ilin pere de Ferunion.

\*

*La socialisma hungara libroeldono ĉiam montris distingitan interesigon rilate al la literaturo de la nacioj de nia suda najbaro: Jugoslavio. Inter 1945 kaj 1973 aperis ĉe ni memstaraj aŭ kolektaj volumoj de pli ol 500 jugoslaviaj aŭtoroj, inter ili egale troviĝas verkoj klasikaj kaj tiuj de la XX-a jarcento. Inter la klasikuloj la hungaraj legantoj povis ekkoni verkojn de Drjić, Njegoš, Stankovič kaj Vasko Popa. Satiĝis la verkoj*



# panoramo

ankaŭ de la pli novaj verkistoj. La unuan lokon de la populareco okupas Krleja, kun 16 volumoj, ankaŭ Ivo Anđrić estas vaste konata pro dekduo da siaj libroj eldonitaj ĉe ni. La plej lasta eldono de lia poeta romano „Ponto tra Drino” aperis en 140 000 ekzempleroj. Krom la jam menciitaj literaturaĵoj en la laborejoj de la hungaraj eldonistoj, kaj en la kadro de komuna hungara—jugoslava libroeldonagado aperis pluraj grandsukcesaj verkoj, inter ili 12 antologioj, kiuj igis ĉe ni publike konataj preskaŭ 450 poetojn, prozaj kaj dramverkistojn.

\*

Intersteno, Internacia Asocio de Stenografio kaj Tajpado en la Hispania urbo Valencio aranĝis sian 30-an kongreson, kiun partoprenis ankaŭ hungara delegacio, gvidata de Dro. László Barabási, vicprezidanto de Landa Asocio de Hungaraj Stenografistoj kaj Tajpistoj. La ĝenerala kunsido decidis aranĝi en Budapeŝto la venontjaran Kongreson de Intersteno, ankaŭ la mond-konkurson de tajpistoj kaj la internacian stenografian konkurson. Por prezidanto de Intersteno por la sekvonta kongresa periodo oni elektis d-ron László Barabási, kiu jam ekde 1959 reprezentas Hungarion en la internacia organizo.

\*

Okaze de la ĉi-jara Leipziga Foiro realiĝis gravaj negocaj kontraktoj inter GDR kaj Hungario. Ni nin devigis liveri elementojn en valoro de 17 milionoj da rubloj por Ikarus-aŭtobusoj kaj hungaraj ŝarĝaŭtoj funkciantaj en GDR, dum, el GDR oni liveros al Hungario krom la ĝis nun difinita kvanto aldone 1500 Wartburg-kaj 5575 Trabant-aŭtomobilojn. Krome la entrepreno Mogürt aĉetis por 3 milionoj da rubloj hejt-aparatojn por la aŭtobusoj Ikarus.


Estis aljuĝitaj ankaŭ la ĉi-jaraj premioj, Hungariaj produktaĵoj gajnis tri ormedalojn. Frezmaŝino de tipo MFI—6—10, produktata de Instrumentmaŝin-fabrika Csepel, mezurilo de densecdiferenco, kiu kapablas mezuri densecon de fluaĵoj kaj de gasoj kun granda precizeco, — ĝin produktis Mezurtehnika Centra Esplorlaboratorio. La tria estas aŭtomata mezurilo de kontinua tensio, tipo TR—1666, produktaĵo de Esplorinstituto de Komunikiltehniko.

\*

La Landa Geologia Esplor-, kaj Bor-Instituto faris kontrakton pri Libanaj esploroj je sumo pli granda ol dek milionoj da forintoj. Laŭ ĝi oni kun tri boraparatoj kaj kun la specialistoj direktantaj la aparatojn faros geologiajn esplorojn por la konstruo de novaj vojoj kaj akvocentraloj.

Tiu ĉi-jara komisiono signifas ankaŭ la dekonon de la hungaraj specialistoj laborantaj en Libano, ja la boraparatoj de la Entrepreno jam la sesan jaron funkcias en la lando.

Krom la kutimaj boresploroj ĉi-jare la unuan fojon estis komisiitaj la hungaraj specialistoj por fari ankaŭ esplorojn geofizikajn.



Fortikaĵo en Sárospatak — foto de János Eifert

„—Mi faris rondiron en Usono. Ĉe la vespermanĝo en iu restoracio la kelnero ŝajnis al mi konata. Ni jam delonge rigardadis unu la alian, kiam li ne eltenis plu, kaj ekparolis angle: — nur unu vorton, sinjoro!

Mi tuj elmetis la atuton, dirante: S á r o s p a t a k . . . — poste ni je la surprizo de la gastoj brakumis unu la alian . . .”

Ĉi supran historieton rakontis popolkantisto Ferenc Béres, en la kunsido de la organiza komitato de la I-a mondrenkontiĝo de oldstudentoj de Sárospatak. La amika societo de la oldstudentoj de la fama Nord-Hungarlanda Kolegio ĉijare somere aranĝos — kun la helpo de Mondasocio de Hungaroj — la unuan tutmondan renkontiĝon de la eksstudentoj.

Sárospatak nome havas „potencon tutmondan”: en ĉiu regiono de la mondo vivas homoj, iam finintaj sian studon en ĉi studenturbo. Ekzemple la universitato de Sidney nun havas kvar profesorojn, iamajn studentojn el Sárospatak; troviĝas inter la eksstudentoj ankaŭ misiisto en Afriko. Oni povus kunsribi longan liston pri famuloj tie lernintaj, ekde literatoroj Kazinczy kaj Csokonai ĝis la antaŭ nelonge mortinta aktoro Sándor Pécsi. Kaj la iamajn studentojn — kien ajn ilin ĵetas la koro ĉiam retiras en la urbon de „Alma Mater”.

Al la ĉi-jara renkontiĝo alvenas gastoj ne nur el ĉiu parto de la lando, sed ankaŭ el malproksimaj landoj, ekzotikaj regionoj. József Hegyi, eksstudento kaj eksprofesoro antaŭ nelonge ricevis la sekvan leteran sciigon:

„— Pere de Svisia ambasadorejo mi sendos al vi preparitan balenidon”. La leteron skribis iama studento de Sárospatak, nuntempe laboranta kiel balenĉasisto.

\*

En la kadro de hungara—angla kooperado oni eksperimente solvis produktadon de izolilo, rigardebla unu el la plej bonaj mondrilate. La nigra plasta izolubando laŭ la rezulto de la eksperimentoj gardas la subterajn kondukilojn en plena sekureco eĉ pli longe ol cent jaroj. La produktadon la Londona firma Long kaj la Plastprilabora Entrepreno „Hungaria” faros komune.

\*

En aprilo en Genevo ankaŭ hungara delegacio partoprenis kunsidon de la Mondasocio de Normaferoj (ISO). En la kunsido d-ro Kálmán Sütő, vicprezidanto de Hungara Normafera Oficejo estis reelektita kiel prezidanto de komitato, kiu okupiĝas pri ekonomiaj efikoj, demandoj de la internacia normigo.

Tr. M. FEJES



# Literaturlegado en fremda lingvo

Kutima plendo de la libroservoj, eldonistoj kaj verkistoj estas, ke la esperantistoj ne legas sufiĉe. Oni jam multfoje ekzamenis tiun ĉi problemon, sed la plimulto de la grumblandoj serĉis la kaŭzon de tiu ĉi fenomeno preskaŭ ekskluzive en motivoj eksteraj, t.e. kolportado, prezo de libroj, lamanta eldona aktivado ktp. Tamen, tiuj problemoj reprezentas nur unu flankon de la problemo. Ekzistas vidpunktoj ankaŭ internaj, nome, la procezo de la realiĝo de la esperantaj verkoj. Estu permesate al mi sen psikologia fakscio, bazante miajn asertojn sur propraj kaj aliaj spertoj, surpaperigi kelkajn pensojn.

Antaŭ ĉio iomete ni vastigu la problemon. Legi en Esperanto preskaŭ senescepte signifas legi en *fremda lingvo*. Ni provu do sekcedi la procezon de la fremdlingva legado.

Signifa ono de la personoj, leganta en fremda lingvo, legas ekskluzive nur fakan tekston kun faka (kaj ne lingva, estetika) celo. Ce tia legado la lingvo restas flanko elemento, la leganton interesas nure la esenco de la enhavo de la teksto. Eventualaj lingvaj, stilaj ktp. spritaĵoj de la aŭtoro estas rigardataj nur kiel superfluaj akcesoraĵoj.

Ce legado de beletro la situacio estas tute alia. La lingvo ĉi tie estas esenca parto de la verko, sen ĝi estetika ĝuo ne ekzistas, kaj la celo de la legado de beletro ĉiam estas ricevi ĝuste estetikajn ĝuojn.

Ni haltu por momento, kaj provu difini, en kio konsistas tiu estetika ĝuo. Mi bone scias, ke grandaj scienculoj jam foruzis multegan inkon por fari ties difinon, tamen, malmultaj kontestas, ke gravan komponenton de la estetika ĝuo donas la momento, kiam la leganto *rekonas* la realon, vidas ian similecon inter la asertaĵo de la verko kaj siaj propraj sociaj, psikologiaj ktp. spertoj, konkludoj. La verko fortigas liajn ŝvebantajn konjektojn pri la temo, kaj li ricevas la impreson, ke li rekonis, solvis ion: li povus krei *Heureka!*, kiel Arhimedes faris siatempe. Spertante tian *rekon-ĝuon* la leganto sentas la verkon vera, reala, do *estetike valoro*. Se la asertaĵo de la verko kontraŭdiras al la spertoj de la leganto, tiu rekon-ĝuo ne aperas.

Tiom pri la aspekto de la enhavo. Tamen, grava fonto de la estetika ĝuo estas ankaŭ la lingvaĵo, la stilo de la verko. Ce propralingva legado meze klera leganto bone kapablas

distingi inter individua, banala kaj malglata stilo. Pri ĉi lasta ni ne parolu, ĝi devas aparteni al la intereso de instruistoj de stilo en elementaj lernejoj. Tamen, inter banala kaj arte individua stilo meza konanto de fremda lingvo distingigas nur malfacile. Ja parolturnoj, vortkunmetoj, komparoj de la fremda lingvo, kiuj mankas el lia propra, ŝajnas al li freŝaj, individuaj, surprizaj, kvankam povas esti, ke ili en la koncerna lingvo jam sentiĝas banalaj, ĉiutagaj, trouzitaĵoj. Do, ankaŭ en *lingva-stila* aspekto aperas la *rekon-ĝuo*: ankorau neuzita vortfiguro, kunmeto, konvinke prezentanta iun ĝis nun ne sufiĉe konatan, tamen konjektitan eron de la fizika, psika ktp. realo, elvokas en la leganto rekon-ĝuon. Sed la leganto de fremdlingva literatura teksto ĉi tie povas esti misorientita: ekz. vortkunmeto, kiu sentiĝas jam kliŝo en la fremda lingvo, por li povas ŝajni nova, freŝa, individua, kaj la elvokiĝinta rekon-ĝuo objektivite estas falsa.

La tria aspekto estas pure *lingva*. Ce propralingva legado tiu aspekto ne naskas rekon-ĝuon, ja kompreni la sencan de iu teksto en la propra lingvo estas normala afero, do neniu aparte entuziasmiĝas pro tio. Male, en ne perfekte regata fremda lingvo la malkovro de la senco de la vortoj, parolturnoj ktp. en si mem povas naski rekon-ĝuon: la leganto spertas ĝojon, ĉar li sukcesis ellegi poemon, novelon, romanon en iu fremda lingvo.

Do, ni resumu la fontojn de la rekon-ĝuo ĉe la leganto en fremda kaj propra lingvo.

## *Leganto en propra lingvo:*

1. Estetika-enhava aspekto.
2. Lingva-stila aspekto.

## *Leganto en fremda lingvo:*

1. Estetika-enhava aspekto.
2. Lingva-stila aspekto.
3. Pure lingva aspekto.

Kiel ni vidas, la leganto en fremda lingvo ricevas rekon-ĝuon el tri fontoj: el ili la lasta estas komplete falsa, ja por la leganto en propra lingvo tiu fonto entute ne ekzistas. Leganto en fremda lingvo ankaŭ el la lingva-stila aspekto ricevas pli da rekon-ĝuo, ol leganto en propra lingvo. Sole la estetika-enhava as-

pekto donas proksimume samkvantan rekon-ĝuon al ambaŭ grupoj de la legantoj. La kvantoj de la diversfontaj rekon-ĝuoj adiciĝas, sekve ekz. el angla romano la leganto, kies propra lingvo estas la angla, ricevas malpli da rekon-ĝuo, ol alia leganto, kiu ellernis la anglan, kiel fremdan lingvon. Kaj, ĉar la leganto prijuĝas la valoron de la verko laŭ la ricevita kvanto de rekon-ĝuo, la ne-angla leganto trovas la koncernen anglan romanon pli valoro, ol la angla leganto. Ne necesas aparte emfazi, kio sekvas el tiu ĉi konkludo ĉe la esperantistaj legantoj — ili ĉiuj legas en fremda lingvo plejparte kun ne pli alta ol meza lingvoscio, do versajne ĉiuj ili supertaksas la objektivan valoron de la legitaĵo.

\*

Tamen, la validado de la supra fenomeno estas limigita. La super-takso fare de alilingva leganto aperas ĝenerale nur ĉe verkoj de malalta kaj meza literatura nivelo. Ce majstroverkoj, kiuj pro la intenseco, denseco de la lingvaĵo (kiuj kvalitoj estas karakterizaj trajtoj de majstroverkoj) postulas pli fortan penadon, ol la simplaj literaturaĵoj, granda parto de la verko restas nekonkerita de la meza leganto, sekve lia akirita rekon-ĝuo ne atingas eĉ la minimuman kvanton. En tia kazo la leganto juĝas la verkon senvalora. Tiu ĉi fenomeno aperas ne nur ĉe legado en fremda lingvo, tamen pli ofte, ol ĉe propralingva literaturkonsumo.


La konkludo estas klara: ŝajnas, ke por legado en fremda lingvo plie taŭgas meznivela literaturo, eĉ, subliteraturo, ol veraj majstraĵoj. Eble tio ankaŭ kaŭzas, ke ofte esperantistoj, selektaj en nacilingvaj legaĵoj, raviĝas pri banalaĵoj esperantlingvaj, dum ili tute ne konas nian vere valoran literaturon.

Tiu misorientiĝo kompreneble estas bremsebla kaj finfine ankaŭ eliminebla. Konsciante pri la supre prezentita fenomeno, oni povas suspekto konsideri sian raviĝon kaj eble dekalkuli iom el ĝi, kaj aliflanke, ne tuj forĵeti malfacilan, ŝajne konfuzan, nekomprenoblan verkon, kiel senvaloran. Tamen, planan eliminon de la fenomeno ebligas nur ĝisfunda lingvoscio kaj almenaŭ kelkmil paĝoj de legita literatura teksto.

V. BENCZIK



# EGER



HEVES MEGYEI TANÁCSI ÉPÍTŐIPARI VÁLLALAT  
KONSTRU-INDUSTRIA ENTREPENO DE KONSILANTARO  
DE DEPARTEMENTO HEVES  
3301 Eger, Klapka György u. II Pf. 7




# ÜGP

MALPEZA  
VANDO  
PANELO

La plato ÜGP estas etagon alta, 6 cm-ojn dika interna apartiga izolvand-elemento el bazmaterialo gips-perlito.

Uzante ÜGP-platon — kompare kun la tradicia izolvand-procedo — la konstrufinaj laboroj estas multe pli-rapidigeblaj. Dum ĉe la tradicia procedo ĉe la konstruado de la vandoj oni devas enporti multan humidajon en la konstruajon kaj por fari estetike konforma la surfacon de la vando estas necesaj pluraj labormanovroj, — la munto de la ÜGP-plankoj por izolvandoj estas simpla, rapida, tre produktiva, la konstruad malsekaĵo estas reduktebla je minimumo kaj per unu laborprocedo donas surfacon konforman por tapetado aŭ farbado.

EGER





# ÜGP | MALPEZA VANDO PANELO

Por planado kaj konstruado de vandoj el ÜGP-platoj estas direktiva la preskribo teknika n-ro ME-94-66. La eksperte planita enkonstruado de ÜGP-platoj estas permesita per la Konstruministeria dekreto n-ro 24/1969. ÉVM lau la supre menciita preskribo.



La ÜGP-vandoplatojn fabrikas surbaze de patento de „Építéstudományi Intézet” (Konstru-sciencia Instituto) la „Heves-megyei Tanácsi Építőipari Vállalat” (Konstru-industria Entrepreno de Konsilantaro de departemento Heves), 3300 Eger, Klapka u. 11.

Telekso: 63-337

Telefono: 16-62




La entrepreno arangas la frajtadon de la vandoj al tuta teritorio de la lando.

La ÜGP-vandoj de logejoj konstruitaj de la entrepreno estas pri-rigardeblaj.

600

60





**Ĉefaj teknikaj indikoj de ÜGP-plato estas:**

**Dimensioj:**

**diko: 60 mm**

**largo: 600 mm**

**longo: 2500-3000 mm (po 25 mm-a plilongigo)**

**Pezo: 65 kp|m<sup>2</sup>**

**Ŝarg-masiveco de la materio: 50 kp|cm<sup>2</sup>**

**Aer-sonizolado: 28-30 dB**



**Limvaloro de fajrorezisto: 1 horo**

**Surfaco: spegul-glata, post formado de la kunigaj brec-plenigoj tuj estas farbebla, tapetizebla, kovrebla per kahelo.**

**Prilabor-ebleco: estas eble ĝin segi, bori, skulpti, najli, tajli en direkto de longeco kaj transverse.**

**Eblecoj de almontado: elektromuntaĵo, ekstermuraj masinad-kondukiloj.**







Laboron vi ŝparos,  
se vi aplikas vandon  
**ÜGP!**

Ĉiu kvadratmetro da vando ÜGP estas pretigebla per 0,76 laborhoros pli rapide, ol la tradicia brikmuro morterita, glatigita per trulo.



**SEN GRADOJ**  
**STARIGEBLA**  
**FACILE MUNTEBLA**  
**APOGIL-STRUKTURO**





# Sen gradoj starigebla facile muntebla apogil-strukturo

Evoluigantoj: **Bányászati Kutató Intézet** kaj  
(Minej-industria Esplor-Instituto)

**Heves Megyei Tanácsi Építőipari Vállalat**  
(Konstru-industria Entrepreneo de Konsilantaro  
de Departamento Heves)

Fabrikas kaj komercigas: **Országos Bányagépgyártó Vállalat**  
(Landa Minej-masinojn Fabrikanta  
Entrepreneo)

La apogilstrukturaĵo estas uzebla por teni la plafonbretaron por betonizo. Tri bazajn elementojn, kluj konsistas el kolono, trabo kaj kolonfiksígilo, povas movi-kunmeti per manlaboro minimume du homoj. La strukturaĵo subtenanta la bretaron ne havas ŝtupan gradigon, tiel ĝi ebligas alĝustigon de precizeco milimetra. La kosto de la apogila konstruaĵo estas por unu kvadratmetro ĉe 200-foja uzo 8,- Ft/m<sup>2</sup>. La apogilkonstruaĵo konformiĝas al modulsistemo akceptita en Hungario, do en ambaŭ direktoj de la horizontala ebena estas formebla ia ajn dimensio je la 30 cm-a pligrandigo.

La plej peza peco de la bazaj elementoj estas sub 20 kp/peco, do permane estas facile movebla, transportebla.

Ne pretendas ĝi faklaboriston, instruita laboristo povas konstrui la apogaĵon de 200 m<sup>2</sup>-a bretaro dum 8-hora labortago.

Informojn donas:

**Bányászati Kutató Intézet**

1300 Budapeŝto  
Postafiók 115  
III. Mikoviny u. 2.

**Heves Megyei Tanácsi**

**Építőipari Vállalat**

3301 Eger  
Postafiók 7  
Klapka György u. 11.

**Országos Bányagépgyártó**

**Vállalat**

1325 Budapeŝto  
Postafiók 70  
IV., Baross u. 91-95.



# La sonĝo de la akvodukto-muntisto

Do komprenu jam, homido, ke mi ne povas vin enlasi, diris la juna soldatvesta pordisto perdinte sian paciencon, „eble krom mia identec-legitimilo ĉu mi montru ankoraŭ kelkajn dokumentojn”, li daŭrigis obstine, „jen mia sindikata legitimilo ekde 1937, la ruĝa libreto ekde 1943”, sed kamarado, komprenu min, ĉi tien ne eble enveni, „vi ankoraŭ ne vivis en la mondo, kiam mi jam suferis en prizono de Horthy”, ĉu vi ne kapablas kompreni, ke oni povas ĉi tien enpaŝi nur kun bileto, kiun oni donos ĉe la elirejo n-ro kvar, kiomfoje mi diru al vi tion, „tiavoĉe diru al mi nenion”, li diris kaj turnis sin de la gardisto sensalute kaj bruske enpaŝis en ĉambreton, kie jam atendis du personoj, sed li iris rekte al la fenestreto kaj diris, ke li volas paroli kun kamarado B., juna virino sidanta malantaŭ la fenestreto, gapis, de kie vi venis, kamarado, ŝi demandis poste, „de mia laborejo, el laborsekcio”, li diris, kial vi volas paroli senpere kun kamarado B., demandis la virino, „tion mi diros persone al li mem”, li diris, kaj al iu anstataŭulo aŭ sekretariejestro ĉu vi ne povas eldiri, „ne, car tiu afero estas tiom intima”, kia afero, „mi povas diri nun nur tiom, ke afero komun-interesa, kaj aldone, ke ne nur de landa signifo”, li rimarkis, ke la virino jam suspekta lin mezuradas, pro tio ankaŭ diris, „ne timu, belmaminjo, mia nervo-menso-stato estas tute bona, donu jam al mi tiun permeson al kamarado B.”, sed kial insisti ĝuste pri li, ja ĉiu scias, ke li estas ege okupita, „nur tial, ĉar la afero apartenas ĉefe al li, kaj lin mi konas el la junulara movado”, sed tamen, kio estas via profesio, scivolis la virino, „mi estas akvodukto-muntisto, lindulinjo mia, se diri vulgare, merdo-purigisto, sed ne maltrankvilu pro nia renkontiĝo, ĉar mi kapablas relative inteligente esprimi miajn pensojn, ĉar mi havas ankaŭ tiajn, ĉarmulinjo mia, jam aperis de mi kelkaj poemoj, kaj ne admiru mian elegantan vestaĵon, mi devas konfesi, ke tio estas mia malnova pasio, mi adoras vestaĵojn faritajn laŭmezure, do ne kedu okaze, ke vian revolucion singardon ia princido Esterházy deziras trompi, sed skribu jam tiun enir-permeson, ne atendigu min ĉi tie”, ĉu mi atendigas vin, ĉu ne vi interpretiĝis antaŭ du kamaradojn, kaj eĉ vi indignas, „jes orfraŭlino mia, ĉar se vi povus nur suspekti, pri kia ega ideo temas, vi mem persone ekondukus min per via princina maneto, ĉar ĉu vi havas eĉ konjekton pri tio, kion konstatas, pri kio povas konsciiĝi eĉ akvodukto-muntisto, ĉu vi jam vidis en la kinejoj la anoncon de la Ĉesurba Akvoentrepreno pri la malbonaj gutantaj akvokranoj, guto post guto, kaj jam elfluis unu forinto,

kaj poste multaj centmiloj kaj milionoj da forintoj forfluas tiel, ankoraŭ vi ne konjektas, kian mond-sensacian ideon mi deziras donaci al vi, jasmefloro mia, tian armilon, kian oni ankoraŭ ne inventis por venki la mondkapitalismon”, rigardu, mi ne havas tempon aŭskulti viajn fantaziaĵojn, mi petas la sekvantan kamaradon, diris la virino, pro tio li furioziĝis, „aŭskultu, vi pisulineto, se vi ne donos al mi tuĵ enirbileton, mi montros al vi”, ĉi tie vi montros nenion, ĉar vi estas ebria kaj ne scias, kion vi parolas kaj precipe: kie vi parolas, „ĉu mi estas ebria de du decioj da vino kun ŝprucakvo, kiom mi trinkis post mia laborsekcio, ĉar mi soifegis dum la okhora laborado, kaj dume mi senĉese rompis al mi la kapon, kiel diri mian ideon al kamarado B.”, li ne povis fini la frazon, ĉar neatendite aperis ĉe la transflanka pordo de la ejo uniforme vestita viro, kamarado kaporalo, forigu de ĉi tie ĉi tiun ĉikanulon, surmontris lin la virino, kaj la juna soldato flegme elpaŝis el la vitrobarita ejo, prenis lian brakon, kaj li protestis, sed honte sentis, kiel komike malforta estas lia malgranda staturo de kvindek kilogramoj kontraŭ la urso-aspekta junulo, kiu ekstere delasis lin kaj diris milde, iru bele, bonulo kaj ne skandalu ĉi tie, ĉu vi ne vidas ke la plej maltaŭgan ejon vi elektis por via unu-persona arenado, legu tiun tabulon kaj portu vin for, cent metrojn de tie ĉi troviĝas la unua vinglutejo, tie vi povos vin plensuĉi, kaj por ke vi ne tro velku, mi diras, ke tie oni verŝas diajn vinojn, region-karakterajn, certe vi trovos ian laŭdeziran, nu, pinĉadu jam vin mem, paĉjeto, dum mia anĝela koro sufloras al mi miajn vortojn, „ankaŭ vi iru al la . . .”, mi ne konsilas, paĉjeto, ke vi sendu min ien ajn, ĉar se el miaj anĝelaj vortoj vi konkludas, ke mi estas ŝafpacienca, vi ege eraras, ĉar per unu bato mi enigis vin en la asfalton kiel la najlon numero cent en col-dikan pinligno-tabulon, nu, ekspedu vin, li eĉ puŝis lin, tiel ke nur post kelkpaŝa ŝanceliĝado li reprenis sian ekvilibron, tiam li turnis sin, sed la soldato jam malaperis malantaŭ la pordo numero kvar,

en la drinkejo li elektis el la vinprezaro muskatvinon „Akali”, el ĝi li petis du decilitrojn kaj kvar pecojn de „ringetoj”, la kasistino kelkajn momentojn rigardis lin gape, „eble la sinjorino ne konas tiujn fajnajn sardel-ringetojn, kiujn oni konsumas pikitaj sur dentpurigilo kiel vinoglitigilojn”, tiajn delikataĵojn ni ne havas, diris la kasistino, en tia drinkogroto, kie vi vivas, sinjoro, drinkuloj vizitadas ĉi tie, ne franduloj, „tiam mi petas la plendlibron”, pro kio vi bezonas ĝin, „tio estas tute mia propra afero, violhara princinjo mia”, ĉu vi ne deziras an-



taŭe kontaktiĝi kun la ĉefo, sinjoro, „elkore, se vi sendos lin ĉi tien, velurprunelokulinjo mia, kaj ankaŭ la ĉefo miris dum momento, poste li rigardmezuris la kostumon de la gasto, opiniis kompreni la ege nekutiman deziron, ho estimata sinjoro, li diris, vi eble ne kredos tion, sed dum mia unu-kaj-duon-jara ekzisto ĉi-tiea vi estas la unua, kiu deziras ringetojn apud sian vinon, ja, kie jam troviĝas gastoj de tia nobla gusto, via sinjora moŝto eble surpriziĝis, ke per ringetoj ni ne povas vin servi, „ĉu vi scias, sinjoro, mi estas tre surprizita, ĉar mi havas tute simplan baz-principon, ke ĉiu en sia propra laborejo plenumu sian laboron laŭ sia plej bona scio kaj eblo, kaj tiam ĉio prosperus, tiel ke ni ĉiuj miradus. ĉu eble ia sorĉado okazis, ni estas jam en la Paradizo, kaj nun mi povas al vi diri, ke najbare troviĝas delikataĵvendejo, sendu tien iun el la rozburĝonulinjoj, kaj vi vidus, ke ankaŭ aliaj petos ringetojn, se ili malkovros, ke tiuj ekzistas”, kaj la fraŭlino post momentoj alvenis kun la delikataĵo, kaj ŝi puŝis ĝin kun abomeno antaŭ lin, jen, sinjora moŝto, ĉu vi havas ankoraŭ ian deziron, „jes, sole tiom, ke vi bonvolu paroli al mi kaj ankaŭ al aliaj gastoj ĝentile, sen mismieno kaj grobeco, ĉar, se tion ne malpermesus mia rafiniĝinta gusto, ankaŭ mi povus redoni viajn insultojn, ke vi ne povus eĉ balbuti, kakteto mia, do mi ne estas al vi sinjora moŝto, nur simple: sinjoro, sed tio ĉiam, rajtpretende”, ha sinjoro, ne ĉagrenu vin la stumbloj de malsperta knabino, trankviligis lin la ĉefo, nu, kiel gustas la ringetoj kaj la vino, sinjoro, „vere, ambaŭ estas bongustaj, dankon”, ho, mi ĝojegas, ke vi fartas ĉe ni bone, sinjoro, kaj se vi ne prenas tion por altrudiĝo, estimata sinjoro, vi certe komprenos, ke post ĉio ĉi min ege pikas la scivolo, kio povas esti la okupiĝo de tia niatempe rara ĝentilhomo, „ankaŭ vi ne ofendiĝu, sinjoro, se vian demandon ja mi prenas por altrudiĝo, ĉar mia okupiĝo havas absolute nenion komunan kun la kvar ringetoj kaj du decioj da vino ĉe vi konsumitaj, ĉar se mi dirus, ke mi estas akvodukto-muntisto, vi tion eble ne kredus”, ve, sinjoro, ne ridigu min, via aspekto, kaj la digno de via aplombo estas tiel aristokrataj, konvenas prefere al aktor-artisto, kvazaŭ ŝajnas al mi, ke mi jam vidis vin en la televido, nur mia memoro paneas, „ne streĉu vian memoron, sinjoro, mi dankas la vinon kaj la ringetojn, ankaŭ al vi, mia eta kaktofloro, kaj li iris alekstere, ni havu la honoron ankaŭ alifoje, sinjoro, diris la ĉefo, mi vin certigas, ke de nun vin ĉiam atendos freŝaj ringetoj, ankaŭ la pordon li malfermis antaŭ la gasto, klinis sin, respekton, sinjoro,



Zoltán Balássy: La Majstro kaj Margarita (ilustraĵo)

kiel nubskrapilo, kaj li iel treniĝis en la detruan akvokirlon de la subfluegantaj akvogutoj, kaj jam sufokiĝadis, kiam li vekigis, lia edzino, kun biblia nomo kaj tia sama dimensio, sidiĝis en la alia lito kaj demandis, eble vi sonĝis ion malbonan, koreto mia, tiel vi kriadis, „neniam mi sonĝis pli admirindan”, li diris, ĉar tiam subite, ĉe la lumo de la vekigo, ekbrilis en lia cerbo la kompreno, kia potenco en civilizita lando estas la akvo, la akvo-provizado, li elsaltis el la lito, prenis paperon, globkrajonon kaj komencis kalkuli, kaj ĉiuj petoj de Raĥel ne relogis lin en lian liton, tie lin trovis la tagiĝo ĉe la tableto, poste li iris labori, sed en lia menso seninterrompe kirliĝadis la ideo nokte koncipiĝinta, ĉi tiun li formadis, perfektigadis kaj senpacience atendis la finon de la labor-sekcio, ke li povu kuri al B. kaj transdoni al li la grandan sekreton senprokraste,

ĉi tie juna viro sidis malantaŭ la fenestreto kaj demandis lin, „mi volus paroli kun kamarado R.”, de kie la kamarado venis, momente li ne sciis, de kie oni povas veni, poste li respondis, komprenante la humuron de la situacio, „dehejme mi venis, nur dehejme, kara kamarado”, kamarado R. hodiaŭ ne havas akcepto-tagon, ĉu via akcepto estas eble priparolita, demandis la vangharara viro, „ĉu kamarado R. estas aŭ ne estas ĉi tie”, li demandis, ĉi tie

aĉe li fartis; surstrate li haltis cerbumante, poste en lian kapon venis lia iama amiko, R., nun li vere estas granda homo, al li ankoraŭ li estus preta rakonti sian ideon, jes, jam ankaŭ en la movado montriĝis, kiel elstara estas la menso de R., kaj dum li trairis tri stratojn ĝis la oficejo de R., venis al li en la kapon lia nokta sonĝo, en kiu ree aperis tiu bildo vidita en la kinujo posttagmeze, tiu granda krano flufaliganta akvogutojn forint-ampleksajn,




# DIHIDRON-HEGROMATIC

**Aŭtomata kaj  
duonaŭto-  
mata  
jonŝanĝiloj**



Fajnmekanika  
Entrepreno  
en  
Nagykanizsa



**NAGYKANIZSAI FINOMMECHANIKAI VÁLLALAT**  
NAGYKANIZSA, SZABADSÁG TÉR 12  
Telefon: 13-120 – Telex: 33208



# DIHIDRON

## DIHIDRON - HEGROMATIC

### Aŭtomata kaj Duonaŭtomata Akvo - kaj Malpurakvo - purigiloj

La entrepreno okupigas de jardeko pri fabrikado de akvopurigaj instalajoj. Dum tiu periodo multaj en-kaj eksterlandaj uzantoj konvinkigis pri moderneco de niaj produktoj. Niaj instalajoj estas bone aplikeblaj sur diversaj uzadterenoj, estas envicigeblaj en iun ajn teknologian vicon de akvoprilaboro, kaj estas taugaj por solvi ankaŭ individuajn, specialajn taskojn. Niaj instalajoj estas produktaj sur monda nivelo. La uzo de niaj jonsangiloj laŭ sistemo aŭtomata aŭ duonaŭtomata signifas enkondukon de la plej modernaj akvomoligaj kaj sensaligaj procedoj.

Niaj instalajoj pro sia konstruo kaj pro la uzitaj materialoj respondas ankaŭ al la postuloj de la nutraĵindustrio.

Surbaze de la enlandaj kaj eksterlandaj spertoj ni vaste uzas la modernajn plastaj-elementojn.

La baztipoj de niaj instalajoj funkciantaj en duonaŭtomataj kaj aŭtomataj uzinoj povas esti:

1. moligiloj
2. plenefikaj sensaligiloj
3. instalajoj konformaj por specialaj taskoj

Inter ĉi tiujn ni vicigas la jonsangilojn, kiuj diferencas de la instalajoj menciitaj sub punktoj 1 — 2, aŭ havas instalajojn kompletigantajn tiujn, aŭ provizitaj per kolonoj.

Tiuj povas esti:

- malvarmaj sengasigiloj,
- oksigenforigiloj,
- adsorbiloj de organikaj materialoj,
- forigo de silikacid-spuroj
- senacidigo,
- senvenenigo de galvanaj gargar-akvoj!
- reakiro de noblaj metaloj el galvanaj gargarakvoj!
- senferigado kaj senmanganigo de industriaj kaj trinkakvoj,
- apliko de sistemoj diferencaj de la supraj, difinitaj de la teknologio pri jonsango.

Okaze de funkciigo de instalajoj menciitaj sub ĉiuj tri punktoj, aŭ memstara aplikado de iu povas esti necesa la forigo de swebantaj aŭ solidaj malpurajoj de la akvoj. Ĉe tiaj okazoj estas motivita la enkonstruo de mekanikaj filtriloj de konvenaj povoj, liverataj ankaŭ de nia firmao.



# FAVORAJ KVALITOJ DE NIAJ INSTALAĴOJ

ILIA PRISERVADO ESTAS RAPIDA KAJ SIMPLA,

NE BEZONAS APARTAN MANIPULANTARON,


ILIA MANIPULADO NE BEZONAS ALTAN TEKNIKAN SCION,

ILI FUNKCIAS PER KONTRAŬFLUO,

ESTAS EKONOMIAJ KAJ LABORAS KUN BONA EFIKECO,

ADAPTEBLAJ AL AŬTOMATAJ LABORPROCEDOJ, SISTEMOJ,

NE BEZONANTAJ SPECIALAN KONSERVADON.







Erika Liqeti: Bartók

## FONDUMO POR MEMORO DE BARTÓK

Vidvino de Béla Bartók, fortepianistino Ditta Pásztorj ankoraŭ pasintsomere sciigis al Dénes Kovács, rektoro de Muzikarta Altlernejo „Liszt Ferenc” sian intencon fari fondumon por la talentaj studentoj de fortepiano-fakultato. La sumo de la „Stipendio Bartók Béla — Pásztorj Ditta” estas po kvin mil forintoj monate, kaj tiu stipendio estos anoncata ĉiujare la 25-an de Marto, okaze de la naskiĝtago de Béla Bartók.

La rajton direkti la fondumon kaj designi la stipendiulojn la artistino lasis al la rektoro, al la prezidanto de la stipendia komitato kaj al la profesoroj de la fortepiano-fakultato.

Ĉi-jare la komitato aljuĝis stipendion al kvin studentoj bone konataj de la koncertpubliko: Kálmán Dráfi, Jenő Jandó, Attila Némethy, Imre Rohmann kaj András Schiff gajnis po mil forintojn persone kaj monate por tempodaŭro de unu jaro.

La altlernejo — laŭ la sciigo de rektoro Dénes Kovács — kun granda ĝojo kaj danko akceptis la noblan geston de sinjorino Bartók rilate al la ĝerunuloj komencantaj sian karieron, kaj esperas, ke tiu fondumo pli efike inspiras la studentojn de la fortepiano-fakultato al la pli alta nivelo de arta laboro.

## LASZLÓ BENJAMIN SOCIALISTOJ

Ni estas. Eble tial nin evitis  
la morto, ĉar ni ne evitadis ĝin.  
Ĉeestis ni mur-kraŝon, tegmentfalon,  
sed ĉiam kune kun la niaj,  
ne fosis ekstran danĝer-elirejon.

Ni'stis kiel pilotoj flug-elprovaĵ,  
ĝis vom kaj sven turnataj en centrifugiloj  
en ĉeloj de mallumo, en kameroj de malsato,  
en stato de senpezeco kaj en tropremo atmosfera.  
Per ni eksperimentis ĉi epoko,  
per ni elprovis, kion hom' eltenas.

Ni estis en ringoj de malamoj ostorompaj,  
ĉasbestoj en rondĉaso, pupoj ĉe celpafado,  
sed ni kuraĝis ree kaj ree surpreni kaj negi,  
kaj ne igis nin kaptitoj la renegataj  
memkompatoj,  
dizertaj afektadoj, filozofioj de la morto.

Ni restis tutaj en la malespero,  
tutaj en suprenleviĝo, tutaj en infrenfalo,  
tutaj en kredo,  
ni estis tial, ke ni faru ordon  
en ni mem kaj en la mondo.

Jam super ĉiu fato kaj ĉiu hazardo,  
kune kun niaj, elpalpante la vundojn de la tero,  
ni pledas procepe por la vivo, juĝante kaj  
juĝate:  
kun memoroj amaraj en la koro, kun la ŝarĝo  
de l'mondo sur la ŝultroj — kaj buŝangule  
kun la rideto de la postepoko.

Tr. K. KALOCSAY

## B'ALDUR RAĜNARSSON: PAŜOJ

La ordono  
absorbiĝas senpetole  
en nian dediĉemon  
kiu laŭfronte migras

interplektaj kruciĝoj  
— kiel vejna fadenaro  
transportas rezignojn  
forlasojn kaj senesperajn cedojn  
trans nian vojon

nekomreneblaj respondoj  
rigardas nin  
kiel fermitaj vizaĝoj  
dum ni dediĉas nin  
al ĉiam pli detala zorgo  
pri la egaltempigo  
de la paŝoj





Guula Feledy: Kolombo kaj drako (Paco kaj milito)

GÁBOR GARAI

## KONTRAŬ LA FLUO

Ree ni restis postaj — vi diras, amiko,  
Komence por kriegantoj de lokoj komunaj,  
tranĉiljetistoj de frazismoj, frapantoj de  
brustprotezoj  
ni estis la svage hezitaĵ meditantaj,  
la tro komplikitaĵ;

nun por la sonĝo-vorantoj, fajrer-elbatantoj de  
vizioj,  
tropo-tromultigantoj, multiplikaĵ  
indiferentuloj,  
ni 'stas la soleculoj de fola fido,  
eksmodiĝinte en sencon implikaĵ.

Ne lamentu — ankaŭ min ja skuas naŭzo  
(okazas, ke „la pli bonaj restas postaj”  
post la putina modo, pufoŝvela simpla de menso),  
sed tamen bone estas tiel ĉi:  
nian oldan kredon  
ili, nin pro ĝi glorante, sekrete kalumniis . . .

Nun jam ĝin ne povas tuŝi — eĉ ne aperte —  
kalumnio.  
Laŭ stentoraj duonsurduloj ni jam prelonge  
mutiĝis,  
sed kiuj komprenas el vorto, mi kredas,  
nin ankoraŭ atentus.

Strikte niaproksime — fuko, kot kaj slimo,  
ni naĝas kontraŭ fluo, sed nur en marĉo;  
la genuojn ni vundbatas sur muskaj ŝtonoj,  
sed la akvoj veraj ja nin atentus,  
— el vorticoj pli sovaĝaj jam ni elbaraktis —  
kaj la patrino malproksima nin atentus  
— la ĉiel’ per bluo nin ribeligas, per fulmo  
defendas,  
kaj nian trosalan eternan vespermanĝon  
fridpacienco boligas transe en lontano  
sur senlim de siaj ondoj

la oceano, la oceano.

Tr. K. KALOCSAY



# REVUO DE REVUOJ

HEROLDO DE ESPERANTO en kelkaj el siaj lastaj numeroj regalas nin per multaj interesajoj. Du polaj geaktoroj, *Kalina P.* — *Dobrzynska* kaj *Zbiniew Dobrzynski* fondis du-aktoran teatron kaj kun teatraĵo de pola dramisto faris esperantlingvan turneon tra la mondo: en 11 urboj de Usono, poste en pluraj urboj de Belgio, FRG kaj Danlando. Al Usono invitis ilin la universitato de *Fort Lauderdale*, Florido, konata pri sia favoro al E-o. — *Mario Pei*, la famekonata lingvisto kaj verkisto sendis leteron al la nomita universitato okaze de tio, ke ĝi plene rekonis la studon de Esperanto ne nur eksperimente, sed kiel oficialan parton de sia kursaro. En sia letero Pei tre instrue klarigas, kiel avantaĝe estas elekti E-on kiel lingvon lérnotan: ĝia simpla gramatika strukturo, fonetika ortografio ebligas, ke la lernanto koncentru sian atenton je nura vortolerno. Unulingvaj studentoj submetitaj al relative mallonga kurso de E-o, poste daŭrigantaj la studon de etnaj fremdaj lingvoj, estis multe pli sukcesaj ĉe la lastaj ol tiuj, kiuj frontis tiajn lingvojn sen antaŭa preparo.

— *Andreo Rogov* el Sovetunio skribas pri la lingva haoso en la Berlina tutmonda junulara festivalo: „Per mimiko, gestoj sur stratoj kaj en salonoj, dum ekskursoj gejunuloj primitive, laŭ rimedoj de prahomoj „esprimis” siajn sentojn de amikeco, parolante en sia gepatra lingvo. Primitivismo! Babela turo!” — En la 6-a numero ree temas pri la propraj nomoj. En sia letero de leganto *A. Marshall* skribas, ke la angloj mem ne same prononcas kelkajn proprajn nomojn, ekzemple la urb-nomon *Hull* nordano elparolas „Hul”, dum sudano „Hal”. Tio konfirmas, ke la sola certa bazo por la skribo de propraj nomoj estas la origina skribmaniero, ĉar nur ĉe ĝi ne povas esti dubo, pri kiu loko aŭ kiu persono temas. — En la 7-a numero ni ne povas lasi sen mencio la poemon de *Julius Balbin*, kiu „en nia praktika, pragmata kaj pli kaj pli... barbariĝanta epoko” nostalgias je la homaranismo kaj dezirus transverŝi en la lingvon „la homan substancon zamenhofan, kiun ni ĉiuj certe posedas latente”.

En SENNACIECA REVUO (numero 3), en la rubriko „Ĉies opinioj” eksplodis granda batalo pri la Proksim-Orienta situacio. *J.P. Marmon* pripentras emocio la suferojn de la Palestinaj araboj. Li finas jene: „Ili hodiaŭ ne serĉas ian venĝon, sed rekonstruon de detruitaj vilaĝoj, redisdividon de la terbienoj, forigon de ĉiuj privilegioj. Estas klare, ke tia solvo ne kontentigos usonajn kaj rusajn imperiistojn.” Pum! Kia mirinda mikso! Kompreneble: „du superpotencoj” laŭ la ĉina recepto. Mi suspektas, ke la aŭtoro nur tial faris, spitante al la evidentaj faktoj, ĉi tiun ridindan baton ambaŭflanken, por ke lia letero estu pli favore akceptata de la redakcio. — Ĉi tiun poraraban leteron sekvas du porizraelaj, tiel ke en la Pariza avenuo *Gambetta* kvazaŭ ripetigas lilipute la eventoj ĉe la Suez-kanalo kaj sur la Golan-altaĵo. Scivole mi serĉis ian redakcian opini-esprimon, kiu inter la du kverelantaj partioj metus ian juĝon baze de la ĉiosolva sennaciismo. Almenaŭ tiom, ke tiaj naciismaj kvereloj tute ne koncernas sennaciisman re-


vuon. Nu, tio ŝajnus eĉ tute logika, sed tiam kial aperigi tiujn batal-skribaĵojn? — *N. Bartelmes* en la 4-a numero ribeleme rekonas, ke „La financa potenco troviĝanta koncentrita en malmultaj manoj diktas la vivnivelon kaj la vivmanieron de la popolo; tiuj malmultuloj regas super la tuta mondo, kaj ili arbitre faras la konjunkturojn; en tio tute ne ludas rolon la petrolmanko kaj similaj fenomenoj.” Tamen li optimistas, ĉar Esperanto estas revoluciigilo”. Lia alia espero estas la junularo, kiu „pli-malpli konscie” donos „realan subtenon al niaj ideoj” kaj tiam „ektremos la nunaj registoj en sia marĉo”. Ĉi tiu lasta frazo min preskaŭ entuziasmigis. Sed poste tiun entuziasmon velkigis du aferoj: unue la pli-malpli konscia junularo en sia laŭdinda revolucio estas pli-malpli konscio-manka, tial oni plurfoje vidis ĝin ribeli ankaŭ kun kontraŭrevoluciaj celoj; due, *Bartelmes* konfesas, ke lia sennacieca idealo „ankoraŭ ne eliris el la embria fazo, sekve estas ankoraŭ tute pala kaj preskaŭ senefikeca”. Mi timas do, ke se la mondo devas atendi de SAT sian savon, tiam la nunaj registoj ankoraŭ longege kvakos grase en sia marĉo.

La SVISA ESPERANTO REVUO, kun tre ĉarma bebo-kapo sur sia kovril-paĝo enhavas interesajn rememorojn de *Elsa Schweizer*, Zürich, kun la titolo „Antaŭ 50 jaroj”. Ni sciiĝas el ŝia artikolo, ke tiam la idistoj estis tiel potencaj, ke la estraro de la E-a klubo devis peti la helpon de la polico por povi kunveni senembarrase. Mi citu ankoraŭ el la redakcia artikolo: „Ne rapidu serĉi en ĉi tiu numero preserarojn kaj gramatikajn mispaŝetojn! Ankaŭ ili emas vivi!” Mi opinias, ke ĉi tio esprimas la sekretan deziron de ĉiu redakcio, ankaŭ de la nia (pri gramatiko tamen mi estus iom pli severa).

ESPERANTO de UEA estas tiel riĉa de materialo, ke la revuanton ĝi malesperigas. Mi povas elpinci nur du aferojn el la 2-a numero. La unu estas la ĝojinda sciigo, ke peticio pri enkonduko de E-o en lernejojn estas oficiale akceptita en la japana parlamento kaj transdonita al la Kabineto por plia kompletigo. — La dua novaĵo montras, ke E-o pli kaj pli konkeras por si lokon en Usono. La Modernlingva Asocio de Usono aranĝis por la E-a studgrupo du sinsekvajn seminariojn pri E-a lingvo kaj literaturo. Laŭ mia abomena kutimo mi citas tion el la riporto, pri kio mi ne konsentas: „Aparte ne akceptebla estas la aserto, ke adasismaj rimoj estas neuzindaj. Tiaj rimoj estas ja uzataj de la plej bonaj E-aj kaj nacilingvaj poetoj.” Unue, de tridek jaroj mi ne legis novan E-an poemon de bona poeto kun adasismoj. Due, la adasismoj aŭ sufiks-rimoj (anta-anta, ita-ita, ema-ema) estas malkaraj ripetoj de la sama elemento kaj tute malhavas tiun sorĉon de la rimo, ke tre malsamajn nociojn interkroĉas sona parenceco (krusto-justo, prismo-abismo ks.). Mi kredas, ke en kelkaj literaturoj la rimojn oni eliminis el la versoj pro tio, ĉar pro la plateco de la adasismoj ili perdis sian ĉarmon. En la hungara, kie la rimoj estas plenaj de agrablaj surprizoj, la poetoj, post kelktempa konformiĝo al la okcidenta ekskomuniko de rimoj, pli kaj pli revenas al la rimado.



## En la spirito de la paca kunekzisto



Nia karmemora Esperanto-poeto Julio BAGHY en sia poezio fandis la patriotismon kun internaciismo. En la poemo sub titolo „Danuba voĉo” prikantas tiujn sentojn. Ni citas el tiu poemo tipan parton en la vicoj horizontalaj 1., 42. kaj vertikala 47. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon. Limdato de la ensendo: 15a de okt. Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

**HORIZONTALAJ VICOJ:** 13. ... lo dekoraciita juvelaĵo el gravurita arĝenta folio. 14. Per kio oni kovras tegmenton. (Radiko) 15. Virnomo. 16. Karesa formo de Edmundo en franca lingvo (EDME). 18. Laŭvorte rediras. 20. Germana komponisto, muzikisto (Johan Sebastian 1685—1710). 21. Mallonga literatura verko, studo (R). 23. Tendence malprosperanta. 25. Naturan teran altaĵon. 28. Dramo de Ŝekspiro: ...kaj Julieta. 29. Kvar — per romiaj ciferoj. 30. Faris aktiva iun. 33. TU. 34. Ia nombro de samspecaj objektoj. 35. Bedaŭrus sian pekon kun deziro ne rekulpi. 38. Instrumente. 40. Nitrogeno, sulfuro kaj oksigeno. 41. Eligas voĉmodulatajn harmoniajn sonojn. 44. Malsaniga haladzo. 45. Solo en opero (R). 46. Movanta akvomaso, hulo (R). 47. Ano de malaltkreska negra gento vivanta en Centr-Afriko. 48. Valora metalo. 50. AK. 51. Rilata al fraphamoniĝo. 54. PA. 56. Vicreĝo aŭ guberniestro en islama Hindujo (R). 58. Manĝeblaj maraj moluskoj. 59. Trupoj de muzikistoj ludantaj diversajn instrumentojn. 62. Reen: indiko (R). 63. Speco de grimpoplanto en tropikaj arbaroj. (R). 64. Ciu el la egalmezuraj kaj samarangaj dividoj de poemo (R). Diru aproban adverb-interjekcion! 68. Gvidanto de rumana kampana ribelo en la jaro 1784. (Nikolae Ursu). 70. Hulis. 72. Senvesta.

**VERTIKALAJ VICOJ:** 1. Parto de la fiziko, koncernanta la gasojn (R). 2. Reen: rilata al supernatura estaĵo. 3. Speciala mortero el polvo de argilaj kaj kalkaj ŝtonoj (R). 4. NT. 5. Prave ŝuldata aŭ postulata (R).

6. Sildo de Atena aŭ Zeuso (R). 7. Hazardludo. 8. Aŭdigos sekan mallongan sonon. 9. NM. 10. Renegato de Esperanto, sekvanto de Kabe. 11. Alĝeria havenurbo. 12. Unu el la poetoj de „Esperanto Antologio” aŭtoro de „Uranogedio”. 17. Ekzistis. 19. Mema, identa (R). 22. Miksita veo! 24. Helpi, protekti kontraŭ materiala atako. 26. Ĵeti avidan, amdeziran rigardon al iu. 27. Certa kvanto da mono apartenanta al ni. 31. Varma alkohola drinkaĵo. 32. Arĝentblanka metalo. 35. Malgranda taĉmento de soldatoj aŭ policistoj, garde trairanta urbon. 36. NTE. 37. Loĝanto de la Unuiĝintaj Statoj de Nord-Ameriko. 39. Ĝin vi nun solvas (R). 40. „... kaj semas, neniam laciĝas, pri l' tempoj estontaj pensante” (Zamenhof). 41. Eligi sekan kaj akran bruon de skrapado aŭ frotado. 43. Eŭropa sovaĝa antilopo kiu vivas en montaraj arbaroj (R). 48. Angla verkisto, kiu estas ankaŭ aktoro kaj direktoro de filmentreprenoj (John James 1929—). 49. Malo de raraj. 51. Ŝargaĵo de pafilo (R). 52. El ĝi konsistas la skeleto de vertebruloj (R). 53. Dekoraciu per ordeno. 55. Solon en opero. 56. Nea pronom-adjektivo. 57. BTS. 60. Varoj transportataj en ŝipo (R). 61. Kanto kutima ĉe la Alpanoj, tirolkanto (R). 65. Kredi je iu aŭ io (R). 67. Prepozicio. 69. Sufikso, esprimanta kolekton. 71. Sulfuro kaj argono.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 74/2 (Por turistoj) estas:

FISISTA BASTIONO — INSULO MARGARETA — INTERNACIA FOIRO — STALAKTITA GROTO — KAVALIRA TURNIRO — NATURREZERVATOJ

Libropremion gajnis: Maria Grochowska, ul. Zabia 16 m 6 15—448 Bialystok, Pollando; Frohmüt Kaller, 324 Haldensleben, Pfandegraben 6, DDR; Kovalecz Györgyné, 7694 Hosszúhetény, Fő u. 57. Hungario.

## G. Marin vizitas sian hejmon — la mondon

(Elektitaj pecoj el la postlasitaj notoj de esperantista mondvojaĝanto.) Redaktis Marinko ĜIVOJE. Zagreb, 1974. Eld.: Internacia Kultura Servo. 80 p. 16,5 × 11 cm. (Prezo ĉe la Libroservo de HEA: 25,— forintoj.)

Jen, libreto nepre salutinda, kiu estas intersekta legaĵo por kursfinintoj kaj samtempe valora materialo por tiuj, kiuj volonte konatiĝas kun la interesaj figuroj de la pasintaj epokoj de nia movado.

*Marin* — filo de anglino kaj belgo — estis mondvojaĝanto, kiu travagis dekojn da landoj kun okuloj kaj animo malfermitaj. La plej forta trajto de liaj notoj estas la matura, denaska internaciismo: cetere la titolo mem sugestas tiun penson.

Certe la plej interesa parto de la libreto estas la specimenoj represitaj el lia „Karta Enciklopedio”, prezentanta — kompreneble kun abundaj ilustraĵoj — kuriozaĵojn de la kulturhistorio. Tiuj ĉi 30—40-liniaj artikoloj estas veraj frandaĵoj por komencantoj kaj ankaŭ por bonaj esperantistoj.

Kiel la bele verkita prologo de la redaktinto informas, *Gaspard Marin* mortis en 1969. Tiu ĉi libreto inde konservos lian memoron.



# Kunveno de esperantistaj tradukistoj

La 24-an de aprilo la esperantista laborkomunumo de la Tradukista Sekcio de Hungara Verkista Asocio havis publikan kunvenon en la konferenca salono de la sidejo de la Verkista Asocio. Dudeko da esperantistaj tradukistoj jam antaŭ ok jaroj estis akceptita kiel kunlaborantaj membroj de la Tradukista Sekcio, kaj jam mem tiu fakto, kiel ankaŭ la honorigo de Kálmán Kalocsay per PEN-ordeno, ilustras la reputacion, kiun la esperanta tradukarto havas en hungaraj literaturaj rondoj.

La kunvenon partoprenis ĉiuj hungaraj esperantistaj literaturistoj, inter ili Kálmán Kalocsay, Lajos Tárkony kaj Mihály Gergely, ĉefredaktoro de nia revuo. Nome de la estraro de la Hungara Verkista Asocio salutis la ĉeestantojn Sándor Rákos, konata hungara poeto kaj poemtradukisto, prezidanto de la Tradukista Sekcio de la Verkista Asocio. Li emfazis la gravecon de la laboro de la esperantistaj tradukistoj kaj literaturistoj, kaj petis konkretajn propo-

nojn pri kunlaboro kaj interhelpo. Li certigis la ĉeestantojn pri la helpemo de la Verkista Asocio. Aparte li gratulis la esperantistajn literaturistojn pro la du altnivelaj revuoj de HEA: Hungara Vivo kaj Eszperantó Magazin.

Al lia parolo respondis Mihály Gergely, kaj la postan diskuton partoprenis pluraj esperantistaj kaj neesperantistaj ĉeestantoj. Lanĉigis proponoj pri stipendioj asignotaj de la Verkista Asocio, vigligo de la esperantlingva libroeldonado fare de stataj eldonejoj, tradukado de originalaj esperantaj verkoj al la hungara lingvo kaj ankoraŭ multaj promesplenaj sugestoj. Kreiĝis interkonsento, ke ankaŭ estonte la membroj de la esperantista laborkomunumo estos invitataj al ĉiuj programoj de la Tradukista Sekcio. Resume: la kunveno signifis novan antaŭpaŝon sur la vojo de la rekonno de la taŭgeco kaj valoro de la Internacia Lingvo por literaturaj celoj.

V. B.

## Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉifoje nia enigmo traktos la libron de Lili Promet: *Kuŝanta tigro*. Partoprenos la lotumadon de la libro-premioj tiuj, kiuj alsendos ĝustan respondon minimume al du demandoj.

1. Iu el la noveloj finiĝas jene:

„Cu vi faris tion?” li demandis.  
„Ne. Vi!” diris . . . . al la faŝisto.

*Bv. alsendi la du vortojn, kiujn ĉi tie anstataŭas punktoj.*

2. La redaktinto de tiu ĉi libro estas aŭtoro de tre konata gramatika verko esperanta, kiu siatempe aperis ĉe la eldonejo LM.

*Bv. alsendi la titolon de la gramatika verko.*

3. En iu el la noveloj figuras la titolo de tre konata fabelkolekto el la klasika araba literaturo. (Tamen konkreta aludo pri la verko mankas.)

*Bv. alsendi la titolon de la novelo.*

Limtempo de la alsendo de la solvoj de la nuna enigmo: 15—9—1974.

Solvoj el la numero 1974/2 estas:

1. Ruĝa Aŭroro
2. Sándor Máté
3. Sándor Varga mortpafis Benĉjon tra lia dompordo en 1956

Pro la ĝusta solvo de la enigmo en la n-ro 1974/2 gajnis libropremion: J. Hamann, 705 Leipzig, Püchaner str. 3. DDR; Mária Leczkési, 6530 Békés, Petőfi u. 4.

## Nova hungara Muzeo de Trafiko

En la hungara banejo *Parád* oni renovigis la iaman luksan stalon de grafo Károlyi kaj establis ĝin kiel muzeon de trafiko. Tie oni kolektis la malnovajn, jam ne uzatajn veturilojn de diversaj specoj, krome multajn belajn jungilojn, garniturojn, instalaĵojn, ornamaĵojn uzitajn ĉe veturiloj, vipojn, lampojn, paradajn vestojn de iamaj kočeroj, originalajn kaleŝojn, la pratipon de la „fiakro”, poŝtveturilojn, rusajn ĉaskaleŝojn, multajn bildojn, ekz-e pri la invento de la veturila rado ktp. Kolekto vere unika en la mondo. La muzeo uzas sur siaj bildkartoj ankaŭ Esperanton.

P. Balkányi

11—13-jaraj knaboj deziras korespondi. Ni povos sendi bk-n, pm-n, alumetetikedon, insignojn kaj aliajn interesajojn. — Ĉefurba Edukadinstituto. Budapeŝto, 1021. Vöröshadsereg u. 165. Hungario.



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio  
1368. Budapeŝto, Hungario,  
Kenyérmező u. 6.  
Aperas dumonate  
XIV. jaro. 1974. 4-a numero

Ĉefredaktoro: Mihály Gergely  
Responda redaktoro:  
d-ro Jozefo Mátéffy  
Lingva revizio: K. Kalocsay  
Arta redaktoro: Jozefo Szekeres

Redaktoraro:

D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai,  
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada  
Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy,  
d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan,  
Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó,  
d-ro István Szerdahelyi,  
Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi,  
Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko  
Kökény, Sándor Szathmári, Lajos  
Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.

Redakcio: Budapeŝto, VIII.  
Kenyérmező utca 6.  
Telefono: 141—078

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona  
Entrepeno, Budapeŝto, VII., Rákóczi  
út 54.  
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor  
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoŝtancoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 1900. Budapeŝto. V. József nádor tér 1) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj)  
Ft. 48.—, al eksterlando krome  
Ft 9.60 por afranko.

74. 3581 Dürer Nyomda, Gyula

Indexszám: 25.377



100 JARA ESTAS

**BUDALAKK**


HEJMA  
FAJROESTINGILO  
PER AEROSOLO

EN AŬTOMOBILo,  
EN LA HEJMA MASTRUMADO,  
DUM KAMPADO

gi donas sekurecon!

Por estingi fajron kauzitan de elektro  
Estas ricevebla en fakaj vendejoj!

Fabrikanto: la 100-jara BUDALAKK  
Festék- és Műgyantagyár (Farbo- kaj art-  
rezin-fabriko)



100 JARA ESTAS

**BUDALAKK**



